NORDHUNGARIA INFORMO

Informilo de „Király Lajos" Esperanto - Amika Rondo Miskolc

Januaro – Februaro - Marto 2012-a

6a jarkolekto nro 77-79

Enhavo

Saluto ... 3
Malnovaj hungaraj monato-nomigoj ... 3
Tutmondaj defioj de la klimatoŝanĝiĝo ... 4
Verdiro ... 13
Pentraĵekspozicio por geblinduloj ... 14
Meditmeritaj konkludoj ... 16
Funebro ... 16
Operludoj en Miskolc dum la dua duono de la dudeka jarcento ... 16
Ŝercoj ... 22
Virtuala Muzeo ... 23
Muzeo pri Poŝtoservo ... 23
Nova Esperantlingva libro ... 24
En nia patrujo la jaro 2012a estas jaro de defendo de la Buteo buteo ... 26
Ĉu vi scias, ke … ... 27
Prelego ĉe Hungara Esperanto-Asocio ... 28
La lingvo Beaŝ-a en Hungarujo ... 29
Leterkesto ... 32

Saluto

Karaj niaj Legantoj!

Komencante la 2012-an jaron, mi salutas vin kaj promesas doni ankaŭ en tiu ĉi jaro interesajn, variajn temajn legindaĵojn kun aro da konoj pri nia regiono, lando, pri la esperantista mondo. Niaj informoj ne dependas de la nialandaj ne tre bonaj ekonomiaj cirkonstancoj, ĉar ankaŭ en la estonto ni senbare prezentos la konojn pri la hungaruja vivo, kaj kulturo, homaj valoroj kie ajn estu ili en la mondo. Ni deziras al vi agrablajn legadojn, flugantan fantazion, multe da emo por agado en intereso de nia kara lingvo Esperanto, kies 125-an jaron ni festas ĝuste en 2012.

Malnovaj hungaraj monato-nomigoj

Januaro - estas monato - de la neĝo ŝtormoj, **Februaro** - de rompiĝo de la glacia tavolo de la grundo kaj fluantaj akvoj, **Marto** estas monato de la printempo.

Ekzemplo pri la humaneco…

La evento okazis ankoraŭ la 27an de Decembro pasintjara. Kun mia edzo mi promenadis en urboparto de Miskolc en Alŝo - Majlát por rigardi kiel progresas tie la laboroj de la tramvoj-rekonstruo. Poste ni enaŭtobusiĝis por vojaĝi hejmen. Je la dua halto de la veturilo, mi ekvidis virinon ĉirkaŭe 40. jaraĝan, klopodis iri antaŭen al la ŝoforo en aŭtobuso plenŝtopita de vojaĝantoj. Ŝi petis la ŝoforon ne ekirigi la veturilon, sed restu samloke, ĉar malsanulo estas sur la buso, kiu bezonas tujan kuracistan helpon, pro kiu ŝi petis venigi tien tuj ambulancan aŭton. La ŝoforo vere haltigis la movon de la veturilo, iris malantaŭen al la maljunulo por observi kio povis okazi pri li. Spertante li la samon, ke li ne povas ekkontakti la maljunulon, li tuj venigis la sav-aŭtomobilon. La vojaĝ-publiko descendis por atendi alian aŭtobuson. Ni restis pro scivolemo pri la maljunulo por ekscii; kiun sanproblemon povas havi la jam tre aĝa homo. Li sidis multe malantaŭ ni, pli frue ni ne vidis lin. La junsinjorino plurfoje alparolis la maljunan homon petante lin por rigardi ŝin, premi ŝian al li donitan manon, meti antaŭen sian dekstran, poste la maldekstran piedon, por diri en kiu haltejo li enaŭtobusiĝis, kio estis lia vojaĝcelo, kiel li nomiĝas. Ŝajnis tiel, ke la maljunulo ne komprenas kion volas de li la junsinjorino. Kun larmokule li rigardis eksteren tra la fenestro surde, mute, paralizite kaj tute ne movis siajn ekstremaĵojn. Nur post preskaŭ je la deka peto li povis preni sed nepremi la manon etenditan al li. Eĉ buŝ-malfermi kaj elparoli li ne kapablis eĉ unu sonon. La saman situacion vidis ankaŭ la ŝoforo kaj konvinkiĝis, ke la ĉirkaŭ 80. jaraĝa homo kondutas sin jene ne pro ebrio. Post proksimume 15 minutoj alvenis la ambulanco, al kies kuracisto kaj fleganto la juna virino rakontis pri siaj spertoj pri la grandaĝulo, kiu eble fartas tre malbone. Ankaŭ antaŭ ili la juna virino finprovis la vizaĝtuŝojn al la maljunulo, ekzameninta, ke la tuŝoj de la duonvizaĝpartoj ne estas sentataj de li. Vidante tiujn la kuracisto kaj flegisto tuj sidigis kaj fiksis la maljunulon al portebla seĝo, ili metis lin en la aŭton kaj senprokraste rapidis al la hospitalo estante en distanco 10 kilometroj al la hospitalo. La juna virino menciis, ke ŝi vidis la samajn simptomojn ĉe sia edzo atakita de la apopleksio, kaj ĉar ŝi rimarkis, ke la damaĝitan maljunulon neniu helpis. Ŝi ne volis same lasi lin kun lia malbono. La ambulanca kuracisto

diris al ni; tre bona estis, ke la virino venigis ilin, ĉar siastate la maljunulo bezonis la tujan kuracistan intervenon.

Ankaŭ laŭ mi tre bona estas, ke ekzistas ankaŭ tiuj homoj konantaj la simptomojn de la malsanoj, ne preteriras sensente la helpon bezonantan kompatindulon kaj ĉefe la maljunan homon, sed ili donas belan ekzemplon al ĉiuj pri la homeco.

Kvankam povas esti eĉ pliaj multaj simptomoj, kiujn ni ne rimarkas, sed al la plej oftaj simptomoj de la apopleksio apartenas, eventuale kiel ĝiaj antaŭsignoj: la hazarde elformiĝanta duonflanka membro-malforteco, paraliziĝo, eklangvora stupora duonvizaĝo, la baldaŭ-sekviĝanta parolkomprena perturbo, vortoformada-malfacilaĵo, diplopio, defalo de vidspaco, vidperdo aŭ malpeciĝanta vidklareco, kapturniĝo, kunordigaj perturboj, perturbo de memoro.

Malofte ekzistas, ke la statoj de simptomoj montras rapidajn pliboniĝojn, sed ankaŭ tiuokaze oni devas voki kuraciston, ĉar la simptomoj povas reveni kaj kaŭzi gravan paraliziĝon. Kaj same gravas, ke niaj malbonfarton montrantaj homfratoj ne restu sole, senhelpe pri ilia malsano. Helpu! Helpante ni povas savi vivon! Ankaŭ la maljunulo estas homo! Pri homeco ekzemplon doni ĉiu homo devas!

Sinjorino Adri Pásztor

Sinjorino Adrienne Pásztor

Tutmondaj defioj de la klimatoŝanĝiĝo

1. KONFUZIĜINTAJ SEZONOJ

Ĉiutaga demando de niaj tagoj estas la klimatŝanĝiĝo, kiu jam estas babiladtemo ankaŭ inter nefakuloj. La homo dum sia vivo spertas, ke ćio ŝanĝiĝas, ćio moviĝas. Oni ekkonas la rondiron de fenomenoj de la naturo, la ciklajn reaperojn, kiujn ni nomas sezonoj. Sed nuntempe forte rimarkeblas, ke la kutimaj sezonkriterioj jam tamen ne plu estas karakterizaj. Miksiĝis la ĝis nun konataj trajtoj de la sezonoj kaj novaj, ĝis nun ne konataj aŭ raraj fenomenoj estas rimarkeblaj.

La temposentumon de la migrantaj birdoj embarasas la ŝanĝiĝinta vetero. Foje ili pli frue alvenas ol kutime, sian foriron prokrastas al malfruo. Okazas, ke ili restas ći tie por vintrumi, poste pro la neatendite alvenintaj fortaj frostoj ili ne akiras nutraĵojn, malsatmortas aŭ frostiĝas. Ĉe la rivereto Szinva (sinva) transfluanta nian urbon, jam tra pluraj vintroj mi vidis riveretborde vintrumantajn cikoniojn. Se ili ne trovas manĝaĵojn en la akvo, ili malsatmortas, malvarmiĝas kaj baldaŭe mortas. Plejbonokaze oni portas ilin en la urban bestĝardenon aŭ en la ornitologian observejon, kie ili ricevas konvenan prizorgadon kaj post unu jaro ili povos ekvojaĝi al sia vintra restadloko. Pro la klimatŝanĝiĝo ankaŭ la nutraĵbestoj de la cikonioj iĝas pli malfrue manĝeblaj, pro kio la cikoniidoj ne povas ricevi ĝustatempe la neceskvantan nutraĵon. Pro tio-ći, ankaŭ la cikoniidoj, la cikoniida populacio estas damaĝita. En Hungarujo ĉiujare 80 000 cikoniidoj eloviĝas. En 2010. nur 20 000 restis vivaj, kaj oni povis kalkuli kun forflugo de tiu kvanto.

Ankaŭ la hungarlanda hirundpopulacio daŭre malkreskas jam de dek jaroj. Laŭ informoj: la malpliiĝo de la kvanto de la tri hungarujaj hirundospecioj estas atribuebla parte pro la

klimatŝanĝiĝo, parte al tio, ke la homo ĝenas la birdojn en iliaj loĝlokoj. Sekve la la malmultaj hirundoj jam ne povas efike helpi la repremon de invadoj de kuloj vivantaj apud la riveroj kaj aliaj "vivantaj akvofluoj".

Ni devas mencii ankaŭ la pereon de fiŝoj de niaj akvoj havantaj vivantaron, ekzemple en la rivero Tibisko kaj lago Balatono. Ĉi tiu formorto de la fiŝpopulacio validas koncerne ne nur nian patrujon, sed ankaŭ la rumanian marbordon kaj la nord-polusan marakvon. La akvoj varmiĝas pli grandmezure ol al kia varmo la en tiuj vivantaj fiŝspecioj kaj aliaj vivuloj alkutimiĝis ĝis nun. La pli varma akvo enhavas malpli da enakvosolvitan oksigenon. Tial pereiĝas la fiŝoj. Pro ilia pereo; el la nutroreto malaperas la nutraĵo de la polusaj ursoj, balenoj kaj de la homoj en la arktaj regionoj.

2. AKVO KAJ ALIAJ DAMAĜOJ

Travojaĝinte grandparton de Hungarujo, en Julio de 2010, mi vidis, ke plejparton de la ĝistiamaj agroj kaj herbejoj kovras akvo ekde aprilo. La grundo ne povis sekiĝi pro la ofta kaj abunda pluvo kaj kiel ties sekvo pli grandmezure aperinta kampa akvo, kie pro tiuj sur ĝin jam nestiĝis la akvaj birdoj. Krome dum nia vojaĝo la vido de la vastaj marĉoj etendiĝantaj ĉe la Tibisko-bordoj kaj la trajnaj relparoj estis surpriza, kvazaŭ ne estintus river-reguligo dum la 19-a jarcento!

Nuntempe en Hungarujo oni kulpigas la klimatŝanĝon pro la nekutima pluvo falinta la 21-an de Junio 2010-a. Tiutage rana pluvo torentissur la vilaĝon Rákóczifalva en departamento Jász-Kiskun-Szolnok. Kiel novaĵo aperis dum 2010; la pluv-torentoj, inundoj, kototorentoj, termoviĝoj, ŝtormoj plagintaj preskaŭ ćiun regionon de Hungarujo. Ankaŭ mi konstatis en urbo Miŝkolc du termoviĝojn. La samaj fenomenoj agis detrue ankaŭ en Ĉinio kaj en Pakistano. Laŭ la informo, la Pakistanon atinginta naturkatastrofo estis la kvaroblo de la damaĝo kaŭzita de la cunamo en la 2006-a jaro, detruinta la areon de la Pacifika oceano. Ĉi tie mi mencias informon ricevitan de mia brazila korespondantino: Liette Lęla, laŭ kiu la 5-an de Aŭgusto 2010-a neĝis en Brazilio, kio estis tre rara evento. Tiusezone la norda parto de Brazilio havas 40 C gradojn da varmo – skribis mia amikino.

3. DEGELAS LA GLACIO DE LA POLUSOJ KAJ EKFILTRIĜAS LA METANO

Artefaritaj satelitoj kaj esploristaj grupoj daŭre observas la Nordan-poluson kaj la glacion de Glacia-maro. Degelas la polusa glacio. Se tiu procezo se tiele progresos, - la akvo devenanta el la degelaĵo altigos la marnivelon kaj dum la sekvaj jarcentoj povos subakvigi la insularon de la oceanoj, pluse ankaŭ la malalte kuŝantajn teritoriojn de Mezeŭropo. La klimatŝanĝiĝo pli forte efikas sur la Nordan-poluson dum la lasta duonjarcento, ol alie tion montras la indikoj mezuritaj antaŭ 1979. Ekde la jaro 1979-a. per satelitaj observadoj oni mezuradas la glacion de la Norda-poluso. La pli malfrua, pli densa mara glacio ŝajne estas malaperanta – avizis la glacio- kaj neĝajn datumojn registranta kaj analiza observa grupo de la Unuiĝintaj Nacioj (NSIDC). /Klimatoprotekta Magazino ozonenetwork.hu/ Dum la pasinta duonjarcento ankaŭ plurfoje estis senglacia akvo, sur la Norda-poluso en somero. Komenciĝis la metan-likado de la grundo nun liberiĝanta de la frosto en la iam konstante frostiĝintaj nordaj regionoj, kaj el la marfundo. El la grundo la bakterioj liberigas karbodioksidon kaj metanon, kio plifortigas la varmiĝon – skribas la reta eldono de la semajna gazeto: Der Spiegel. La metano estas dudekkvinoble pli forta forcejefika gaso ol la karbondioksido. (INDEX; la 3-an de Januaro de 2011)

La marnivelaltiĝo ĝis la jarcentofino povas superi la pli frue mezuritajn datumojn. La koralajn rifojn – kiuj donas hejmon al unu triono de specioj de maraj estaĵoj, donas vivmedion

al duonmiliardoj da homoj, kaj protektas la marbordon kontraŭ la marinundoj – minacas la acidiĝo de la oceano – asertas ekspertoj pri la klimato.

4. KLIMATŜANĜIĜOJ EN LA PASINTO DE LA TERO

Ĉi tiuj fenomenoj ne estas solsolaj, ja dum jarmilionoj de la ekzisto de nia Tero multfoje okazis klimata ŝanĝiĝo. La ćirkaŭe ses grandaj malvarmiĝaj periodoj de la terhistorio senteblaj estis sur surfaco de la tuta Tero. La ĝis nun lasta glaciepoko finiĝis antaŭ ć. 10 000 jaroj. Tiu ći lasis spektaklo-rićajn spurojn sur la norda hemisfero. Ekzemple en Finnlando fundojn de pli ol 50 000 lagoj elkavis la glacio. Dum la interglaciaj pli varmaj periodoj tre variis la vivularo de Tero, multloke per tropika temperaturo kaj loke per tre sekaj periodoj. La diversajn epokojn la geologio pruvas plej bone, kiam el la elfosaĵoj malkovriĝas ŝtoniĝintaj restaĵoj de malnovepokaj vivuloj. Inter la hipotezoj, ke kio, kiuj povis kaŭzi la pereon de la malnovtempe vivintaj animaloj – kiuj kaŭzoj ne tuŝis ćie ankaŭ la flaŭron – la plej verŝajnaj kialoj povis esti ekzemple: malvarmiĝo de la klimato; malaltiĝo de la CO2 enhavo de la aero; bruska pliintensiĝo de la kosma radiado; ĝenerala regreso (retiriĝo) de la maroj; ŝanĝiĝo en la salo- kaj mikroelemento-enhavo de la marakvo; pliintensiĝo de la radioaktiveco sur la tersurfaco… krome ni devas paroli ankaŭ pri la vulkanaj erupcioj kaj la falo de meteoritoj.

5. ĈEFAJ FAKTOROJ DE LA KLIMATO

Laŭ la plej akceptitaj teorioj la ĝenerala klimato de nia planedo dependas de kunaj koeficientoj de tri faktoroj:

--konsisto de la atmosfero (laŭ supozo la kvanto de la karbodioksido + metano + akvovaporo)

--situo de la kontinentoj

--la modifiĝoj de orbito aŭ rotacioakso de nia planedo

--eventuale la situo de Suno en nia galaksio.

Ekzistas signoj pri tio, ke pro la homa agado estas ŝanĝiĝanta pli grandmezure la atmosfero, pro la kresko de la enhavo de karbondioksido + metano.

Laŭ mia opinio se nivolas difini la klimaton de iu regiono, ni devas konsideri ties topografiajn, hidrografiajn datumojn de la teritorio, la statistikajn indikojn pri la rilatoj de kvanto de precipitaĵo (inkluzive tion, ću la teritorio rićhavas neĝon aŭ ne, po somero kiom da glacipluvoj falas, kia estas la direkto kaj la forto de la vento, kian temperaturon havas la aero, kiom varmas la vento, kian nubaro-kovritecon havas la teritorio, kiel longas la somero, kiom estas malvarma la vintro. Krome gravas ankaŭ la kvanto de la sunradiado kaj ankaŭ ankoraŭ multaj aliaj, ći tie ne menciitajn indikojn.

6. SAMTEMPE PLURSPECA KLIMATO

Hungarujo situas sur la limoj de pluraj klimataj terenoj. Ĝian veteron formas la Orient-kontinentala, la Okcidenta-oceana, la nord-polusaj aeramasoj kaj la suda-sudokcidenta mediterana efiko. La mediterana efiko la plej forta estas sur la suda parto de Transdanubio, sed demonstreblas koncerne kaj la flaŭron kaj la faŭnon sur la sudaj flankoj de montaroj Mátra kaj Bükk, eĉ iom malpli forte ankaŭ en la Sátor-montoj (de Tokaj ĝis Abaujszántó). La atlantikan efikon la Alpoj devias el sia originala direkto, tiel ĝi alvenas al ni de nordokcidento. La de tie ricevitaj ventoj portas la pli multon da precipitaĵo falinta sur teritorio de la lando. Pli

malgranda estas la efiko alvenanta de sudo kaj sudoriento. La hungaria klimato estas laŭ la sunagada divido modera. Pro ĝia geografia situo ĝi ne havas veterajn ekstremismojn. Pro la eta enlanda latitud-diferenco kaj la neglekteblaj altecodiferencoj, la klimato de Hungarujo estas sufiće unueca, sed nature la influoj de la ortografiaj faktoroj tamen senteblaj estas.

Hungarujo situas inter la 45º 45' kaj 48º 35' nordaj latitudoj, proksimume meze inter la ekvatoro kaj la Norda-poluso. Pli ol duono de ĝia surfaco estas ebenaĵo pli malalta ol 200 metra ternivelalteco, aŭ malalta teritorio, sed la proporcio de 400 metrojn superanta teritorio plimultas ol 2%. En Hungarujo la somero longas almenaŭ 3 monatojn, ĝia meza temperaturo superpasas 18 Cº-n, kaj somermeze la varmo ne malofte superas eĉ 35 Cº. Vintre alternas unu la alian la malmildaj kaj pli facilaj periodoj, sed la nombro de la multe pli ol 0 C gradaj temperaturaj monatoj ne plias ol tri.

La jara mez-temperaturo estas inter + 8 kaj +12 Cº, kaj relative alta estas ĝia variado. La ĝenerala valoro estas la plej malalta en januaro, - 4 ĝis -7Cº, en julio estas la plej alta; 25-30 Cº. La plej malaltan temperaturon: -35 C gradon oni mezuris la 16-an de Februaro 1940-a en urboparto de Miŝkolco (hodiaŭ en Miŝkolc-Tapolca). La plej alta temperaturo: 41 C gradoj mezurita estis en urbo Kiskunhalas, la 20-an de Julio 2007-a. La nombro de la sunradiaj horoj estas inter 1700 kaj 2015. Tio estas la plej alta sur la ebenaĵo kaj la plej malalta en la montara regiono. Tio ći estas grava faktoro por la agrokulturo. La meza averaĝa kvanto de la precipitaĵo estas 500-1000 mm. Sur la Ebenaĵo 500-600 mm, en la montara regiono 800-1000 mm. La distribuo de la precipitaĵo ŝanĝiĝas ankaŭ dum la jaro. Du maksimumoj rimarkeblas: la primara en la frusomeraj monatoj Aprilo-Junio, la sekundara aŭtune, oni povas kalkuli oktobron. La plej malmulte da precipitaĵo falas januare-februare. La nord-okcidenta vento estas la reganta. Miaopinie gravas la dumjara ŝanĝiĝemo de la precipitaĵ-kvanto inter la ekzamenitaj jaroj. La pli granda parto de la jara precipitaĵo falas dum la somera duonjaro.

Hungarujon trapasas ĉiujare pli ol 660 frontoj, kies 80% malvarmaj estas, 20 procentoj estas la varmaj. La pli malgranda parto de la precipitaĵo ligiĝas al tiuj ći frontoj. La plej granda parto de la precipitaĵo falas kiel pluvo, sed ć. 15-60 tagojn neĝas ĉiujare. La neĝkovro sur la ebenaĵo ekzistas dum 25-50 tagoj, sur la montoj ĝia nombro povas esti ankaŭ 25-50 tagoj.

Inter la kvar sezonoj estas grandaj diferencoj. La plej malvarma monato estas januaro, la plej varma la julio.

La taga temperatur-ŝanĝiĝo estas sufiće granda. La jara mez-temperaturo estas ć. 13Cº, la maksimumo 38Cº, la minimumo estas ĉ. -10 Cº.

La printempo komenciĝas je antaŭo de aprilo, kaj tion akompanas grandaj pluvadoj. Pro ĝia kaprica vetero la popola onidiro nomas ĝin freneza Aprilo. La somero seka kaj varma estas. La aŭtuno estas malvarmeta, nebula kaj pluva. La vintro estas relative mallonga, meze malvarma kaj ordinare seka, kelkfoje oni povas baniĝi en admirinde belega sunbrilo.

Du pli pluvaj tempoj (frusomero kaj aŭtuno) kaj du pli sekaj periodoj (mezo de vintro kaj fruaŭtuno) alternas.

La jara averaĝa ventorapideco estas 204 m/sekundo. La klimataj indicoj enhavas plejparte averaĝajn valorojn (jara meztemperaturo, jara mezvaloro de la temperaturŝanĝo, averaĝa precipitaĵ-kvanto ks.) Malantaŭ la averaĝaj valoroj kaŝas sin diversaj temperaturaj- kaj

precipitaĵkvantaj jaroj, unikaj veteraj datumoj de jardekoj kaŝiĝas – laŭ la hungarlingvaj budapeŝtaj kaj landaj veter-prognozaj datumoj de la Hungara Meteologia Instituto.

7. SCIENCA PROGNOZO KAJ POPOLAJ ANTAŬDIROJ PRI VETERO

Krom la veterprognozoj de la landa meteologia fakservo bazitaj sur matematikaj kalkuloj, la popolo konsideras ankaŭ la veteraŭgurojn elformiĝintajn dum la plurjarcentaj observadoj. Ĉi tiuj pruviĝas ankaŭ nun plejparte ĝustaj. Mi mencias kelkajn el inter tiuj, kiel interesaĵojn. Se la duan de februaro elvenas la urso el sia groto kaj tiam sunradias, la urso ektiminte sian ombron rekuras en sian grotkavon. Tio signifas, ke la alvenon de printempo oni devas ankoraŭ longe atendi. Aŭ: se pluvas dum Vince-tago, pleniĝos la kelo. Ties senco estas: se la 5an de aprilo (nomtago Vincento) pluvas (post floriĝo de la vito, tempe de la vinberkreskiĝo), tiam la mastro havos tre multan vinon. Kaj alia: se nomtagon de Katalin (Katarina, la 25-an de Novembro) frostas, kristnaske malseka vetero estos atendebla, do pluvos. Kaj la sekvajara vetero estos tia, kia estis la vetero inter la nomtago de Luca (Lucia, la 13-a de Decembro) kaj Kristnasko (la 25a de Decembro).

8. KIO ESTAS PRUVITA – KAJ KIO NE ESTAS

Laŭ la libro: Klimato de Hungarujo de Zsigmond Róna (Sigmundo,1909) en Buda (parto de Budapeŝto) en la jaro 1700. oni fondis la unuan hungarujan meteologian observan stacion kiel parton de eŭropa reto. Do, en nia patrujo jam pli ol ducent jaroj okazas sistemaj atmosferologiaj mezuradoj. Ankaŭ en Hungarujo estas atesteblaj en la lasta triono de la 20a jc. ekzemple la kresko de la averaĝaj valoroj de la temperaturo de la vintra duonjaro kaj ioma precipitaĵkvanta malpliiĝo, ćefe en la aŭtunaj monatoj. Ne estas pruvita, ke ći tiuj simptomoj devenas de la natura klimatŝanĝiĝo, aŭ ili vere estas la postsekvoj de la tutmonda varmiĝo provikitaj de la homa agado. (Laŭ la Landa Meteologia Servo: Temperaturo de Hungarujo – Meteologiaj informoj) Tiuj modifoj estas tiom etaj, ke laŭ mia opinio – sed ankaŭ laŭ aliuloj, oni ne devas timi tion, ke en la proksima estonteco okazos eĉ la tropika klimato aŭ glaciiĝo.

9. LA 11 KAJ 22 JARA CIKLOJ DE SUNAKTIVIADO

Zsolt (ĵolt) Leitner amatora astronomo en Miskolc, donis la sekvan opinion al la temo: Fine de marto de ći tiu jaro (2010-a) mi havis bonŝancon por aŭskulti – en la Gimnazio de Diósgyőr – prelegon titolan „Sunaktiveco kaj klimatoŝanĝiĝoj" de doktorino Katalin Oláh; prezidantino de la Astronomia kaj Spacfizika Komisiono de Hungara Scienca Akademio (MTA); astronomo de la „Miklós Konkoly Thege" Astronomia Esplorinstituto de MTA. En tiu prelego la preleganto alvokis atenton je tre interesa afero:"ligo estas demonstrebla inter la 11 kaj 22 jaraj Sun-cikloj (minimumoj kaj maksimumoj) kaj la klimatoŝanĝiĝoj de la Tero. Laŭ tio, kiu procezo nun en nia vetero sperteblas, ne estas ununura evento. Tiuj ći ŝanĝiĝoj okazis jam ne nur antaŭ kelkcentmiloj da jaroj, sed ankaŭ antaŭ kelkaj dekmiloj, aŭ kelkcentoj da jaroj. La sunaktivado ankaŭ ćimaniere efikas al nia Tero, plie al nia klimato.

La teran klimaton influas la vulkanoj, la nuboj estantaj en la stratosfero kaj la oceanaj fluoj kaj ankaŭ ilia temperaturo. La vulkanoj enigas sulfurdioksidon en la stratosferon, kio tie kreas tavolon konsistantan el sulfurdioksid-gutoj. Al la klimato efikas ankoraŭ la partikloj elflugantaj de Suno (suna vento) kaj ankaŭ la kosma radiado. Se la sunvento pli grandas, ankaŭ la protekto estas pli forta. Je pli malalta sunagado plura kosma radiado alvenas. La kosma radiado estigas nuboĝermojn el akvovaporo kaj sulfura acido."

10. LA TEORIO DE MILANKOVIĆ-BACSÁK

„György Bacsák (Georgo Baĉak, Pozsony, 5. junio 1870. – Budapeŝto, 4. marto 1970.) jura konsilisto, astronomo, geologo, doktoro de la Tero- kaj mineralogiaj sciencoj (1954) konatiĝis en Pozsony (nun Bratislava) kun la ĉiela meĥaniko. Aŭtodidakte li lernis astronomion. Per granda matematika scio kaj vast-horizonta paleoklimatologia vidmaniero li klopodis rekoni, kaj klarigi la movadleĝojn de la ćiela mekaniko kaj la interrilatojn de la plejstocenaj glaciepokoj. Tiujn ĉi konojn havante, li interpretis la elformiĝon kaj la tempan defluon de la plejstocena epoko kaj glaciepok-teorion de la serba klimatologo Milutin Milanković (Milutin Milankoviĉ 1898-1945), kiu - el leĝoj de ŝanĝiĝoj de la orbit-elementoj de Tero - klarigis per grafika prilaboro de la astronomiaj datumoj la estiĝon de la glaciepokoj. Tiu teorio konsideras la Suno-Tero distancon, la ŝanceliĝon (precesion) de la rotaciakso de Tero, la rotacioaksan angulon, kiuj determinas la kvanton de la surteriĝanta sunradiado. György Bacsák pruvis kaj kompletigis la teorion de Milanković, laŭ kiu la malnormala spaca pozicio de la Tero kreas taŭgajn cirkonstancojn por la estiĝo kaj ripetiĝo de glaciiĝoj.

La Milankoviĉ-Baĉak teorio estis la unua unusence formigita glaciepok-teorio, kiun la multaj jardekoj pasintaj depost ĝia naskiĝo la evoluo ne malkonfirmis…nur ampleksigis."

Laŭ alia teorio „kaze de la glaciepokoj pluraj faktoroj povis elvoki la varmiĝon. Balanciĝo de la rivoluakso de Tero, suneksplodoj, vulkanismo povis esti la elvokaj kaŭzoj, sed la esenco estas, ke la eventoj tamen ćiuokaze kune okazis kun la ŝanĝiĝo de la koncentracio de la karbondioksido.

11. KARDINALA ROLO DE LA CIRKULADO DE KARBONO

1. La karboncirkulado en la verdaj kreskaĵoj okazas pere de la fotosintezaj procezoj.

2. Je solviĝo de karbondioksido en la akvo estiĝas karbonata acido (H_2CO_3), sekvos la acidiĝo de marakvo, pH malpliiĝo). Ankaŭ tio efikas malfavore al la vivularo! La akvo je alta temperaturo ćiam malpli da gaso povas ligi.

3. La karbodioksidon diversprocente povas ligi la C3-aj (mezvarmaj zonaj) plantoj, kaj la C4-aj (tropikaj) plantoj! Al la specio-rearanĝiĝo pro eventuala varmiĝo aŭ malvarmiĝo, plurcentoj da jaroj estas bezonataj!

4. Kaze de la C3-aj plantoj pere de altiĝo de la CO_2 koncentriteco kreskos la kapacito por ligi la CO_2-n, sed dume la plantoj eligas varmon, do grandigas la temperaturon de sia ćirkaŭaĵo. Ni ne forgesu, ke dume la karbodioksidnivelo stagnos, eć ankoraŭ malpliiĝos.

Jes ja, sed far leviĝo de la temperaturo la fotosinteza agado de plantoj atingas ian maksimumon, ćar en alta temperaturo, plie će grandaj temperaturŝanceliĝoj ili jam ne povas ligi la CO_2 gason, sed ili amase pereos ili pro la aliiĝintaj vetercirkonstancoj, la CO_2 koncentracio subite altiĝos, ĝis aranĝiĝas la plantaro de la planedo al konvenan produktivecon donanta nivelo (C4 plantoj). La procezo progresas same ankaŭ retrodirekte, do post la efiko de malvarmiĝo restas ankoraŭ multe da CO_2 pro la pereo de plantoj. Poste la C3-j rearanĝiĝo (kelkcentaj jaroj) la CO_2 nivelo subite malpliiĝas.

DEFLANKIĜO

La degelo de Antarkto – interesa-maniere – ĝuste pro la ozontavol-maldikriĝo malfruis. La malrapide regeneriĝinta ozontavolo ne influas plu la procezojn en direkton de la malvarmiĝo

(pro la malaperanta ozono la forcejefiko ne povis tian gradon atingi, kiel okazis sur la Antarkto); tiel la rapidiĝanta degelo ene de kelkaj jaroj prezentiĝos sur ambaŭ polusoj…"/Prelego de Csongor Horváth redaktoro – Pri la forcejefikaj gasoj – sur la retpaĝo de Klimato-rondo de urbo Tatabánya/:

Kvankam tiel ŝajnas, ke pri la nordaj kaj sudaj glacikovriloj de la Tero ĝuste kontrastaj aferoj okazas, ambaŭ simptomoj estas sekvoj de la homa agado – anoncis John Turner brita esploristo, okaze de la konferenco aranĝita pri la Internacia Polusa Jaro (IPY) en Oslo. Laŭ li la glacio de Norda-poluso degelas de jaro al jaro ćiam pli kaj pli grandmezure pro la kreskanta karbondioksid-koncentracio de la atmosfero. Sed sur alia parto de la terglobo pro iu pli frua homa agado (la fabrikado de freon-gaso kaj ties eniĝo en nian atmosferon) dikiĝas la mara glacikovrilo. La glacio degelas ćiujare pere de ŝanĝiĝo de sezonoj kaj frostiĝas denove…(Erika Csepe/nepszava.hu) Argentinaj ekologoj konkludis, ke ne la alsendado de CO2 al la aero, sed de ŝanĝiĝoj okazintaj en la Suno, kaj ĝia aktiveco dum la lastaj cent jaroj estas la kialoj de la klimato-ŝanĝiĝo.(eo.wikipedio.org)

La klimato-ŝanĝiĝo estas tre kompleksa procezo ankaŭ laŭ Zsolt Leitner Miŝkolca amatora astronomo."La teran klimaton multoj efikas, sed ne egalmezure. Eble plie la naturaj procezoj, la naturaj fenomenoj, ol ni homoj. Sed tio ne signifas, ke ekde tie ni poluciu trankvile nian medion, konstruu mediopoluajn, sanon damaĝantajn fabrikojn kaj dise lasu malpurigaĵojn, ne okupiĝu pri la medoprotektado. Sed tamen nia ći pensmaniero klarigas, kial disputas niatage ne nur la politikistoj, sed ankaŭ la fakuloj, kiom povas esti kulpigebla la homo pro la niatage okazanta klimatoŝanĝiĝo, kaj kiom estas konsiderebebla ĝi kiel natura procezo. Pruvi, ke la klimatoŝanĝiĝo plejparte „dankeblas" al la homa agado, preskaŭ maleblas, ćar ne estas tiel. Sed unuafere mi certas – skribis s-ro Zsolt Leitner - : ankaŭ ćiterene atendas la Homaron tre multe da laboro. Ni devas esplori, esplori kaj esplori, por pli bone ekkoni nian medion, kaj nin mem."

Degelas la neĝo, glacio ankaŭ de la altaj montaroj (Alpoj, Karpatoj, Kilimanĵaro…).La akvoj devenantaj de la degelantaj neĝo, glacio de la altaj montaroj provizas per akvo tre multajn industriajn uzinojn. Mi vidis ekzemple en la francaj Alpoj, ke okaze de la malpliiĝo aŭ perdiĝo de la akvokvanto, tiuj teritorioj eble senpopoliĝos. La ruinoj postrestintaj el tre malnovaj tempoj de la forlasitaj setlejoj, bone videblas sur satelitaj fotoj. Laŭ la indulgoj de la hungara Vikipedio - la libera reta enciklopedio - „niatage la glaciriveroj enhavas la pli grandan parton de la dolĉaakvo-rezervo de la Tero, do de la Alpoj de Eŭropo. Tie estas favora la situacio al elformiĝo de glaĉeroj, kie la teritorio estas super la neĝolimo kaj la plej grandkvanta estas la precipitaĵo."

12. NEĜOLIMO KAJ GLAĈEROJ

La limo de la eterna neĝo estas tiu nivelo de la altaj montaroj, super kiu la atmosfera precipitaĵo falas ĉiam neĝoforme kaj la neĝo neniam degelas. En norda parto de Norvegio tio estas 720 metroj, en Himalajo 5670 metroj, sed en la Arkto ĝi samnivelas kun la marnivelo.

En 2009. dum vojaĝo farita en Francujo kun mia edzo ankaŭ ni ekskursis al la Monto-Blanka, por rigardi la glaciriveron. Kiam la aviadilo flugis kun ni en proksimeco de la plej alta pinto de Monto Blanka - sub ni la nubaro aspektis kvazaŭ senlima neĝkampo – surprizite ni spertis la 30-an de junio 2009-a, ke la pinto de la pli ol 4800 metrojn alta Mont Blanc, nude leviĝis al la brile blua somera ćielo. Ni pensis, ke certe la nivelo de la neĝlimo nun pli supren puŝiĝis, pro tio ne kovris neĝo la pinton. Ĉi tiu neĝlimo en la montarsistemoj de Alpoj kaj en Karpatoj estas 2750 metroj. Dum la tago de nia ekskurso (07.07.2009) tuttage pluvis. Pri

flankoj de Mont Blanc en dikaj strioj kiel akvofaloj falegis la akvo de la degelanta neĝo kaj glacio. De tempo al tempo haltis la pluvo, kaj tiam ni povis vidi la nur ie kaj tie neĝmakulan gigantan monton. De haltejo de la dentrada fervojo de Chamonix, de 2062 metrojn alteca tiea elvidejo ni rigardis supren al la pinto. Neforgesebla, fascina spektaklo estis ankoraŭ tiel senherbeje la plej alta punkto de la pramasivo. Ni aŭdis, ke multaj famuloj vizitis jam tie će la glaćero en Chamonix, por vidi la ćiam neĝan monton. Inter aliaj vizitis tie Goethe (en 1797), Aleksandre Dumas en 1832. Pli poste ni eksciis, ke ankaŭ la fama hungara komponisto Ferenc Liszt (Francisko List) estis tie, li en 1836. Ni aŭdis, ke la tuta longo de la glaĉero Mont Blanc de Chamonix estas 14 kilometroj, ĝia larĝeco 400 metroj, do la glaĉero povis nutri sin kaj povas sinnutri ankaŭ hodiaŭ el granda neĝo- kaj glaciokovrita teritorio. Laŭ onidiroj ĝia vasto kaj dikeco malpliiĝas ĉiujare. Ĉirkaŭ la glacigroto oni povas vidi la bluan koloron de la praa glacio. Ĝi estas ege densa, tial estas tiom blua kaj ne blanka aŭ blankeca ĝia koloro, ĉar ne ekzistas ene aervezikoj kiuj blankigus ĝin.

La „Musée Alpin"= Muzeo pri Alpoj, ekspozicias memoraĵojn de la konkero de la Alpoj. Kiam en 1867 oni komencis konstrui la elvidejan terason, la laboristoj ankoraŭ pene povis supreniri tien pro la monton dense kovrita neĝo kaj glacio. Superhoma laboro estis bezonata trovi la rokon sub la glacio, por fiksi al ĝi la tenajn ferstangojn de vojlinio de dentrada fervojo. Niatage, sur la monton kondukas jam sen- neĝaj kaj glaciaj turistvojoj el la urbo situanta ĉe piedoj de la montarego (de Urbo Chamonix kiu situas en la orienta parto de Francujo, en la regiono Rhône-Alpes). Ni aŭdis plie, se la degelo progresos sam-mezure, jam nur por 20 jaroj sufiĉos la glacio de la glaĉero. La glaĉersurfacon kovras ŝtonfalaĵo kaj griza polvo, kaj ties amaso kreskas ĉiujare. Kiu atendas blanka ĉi tiun glaĉeron, al tiu iome seniluziiga estas ĉi vidaĵo, kiu malgraŭ tio majesta estas.

Ĉe la glaciomaro "La mer de glace" (kiel la francoj nomas la Mont Blanc-glaĉeron) kaj ankaŭ alie en Francujo paroltemo estis la klimatoŝanĝiĝo kaj ties atendeblaj efikoj al la homa- besta vivo, la terkulturado, al la nutraĵproduktado, la akvokvalito, koncerne la industrion kaj la komercon. Ne ĉiu homo pensas, ke ekskluzive mem la homo kulpas pro la ŝanĝoj. Multaj homoj opinias, ke kvankam kaŭzoj sendependaj de la homo povas roli en la ŝanĝiĝoj, tamen ne permesatas, ke la homo tiel grandmezure poluciadu la surfacon de nia planedo.

13. LA NATURAJ, KAJ DE LA HOMO KAŬZATAJ AERPOLUCIOJ

Ĉe ekzameno de la stratosfer-konsisto, ni devas ekzameni ankaŭ la planed-skalan naturan aerpoluciadon, konsiderante, ke la polucion de regiono al la alia portas la vento kaj la precipitaĵo aŭ ĝuste la marakvo.

La neorganikaj poluciaĵoj de la aerpoluciado estas ekzemple gasoj devenantaj el la vulkanerupcioj, vaporo, cindro, la saleroj devenantaj kaj ventoportataj el maroj, gasoj kreiĝantaj dum tempestaj fulmoj, polvo de polvoŝtormoj, krome la kosma polvo. Organikaj faktoroj estas: la fumo kaj polvo devenantaj el forbluo de plantoj (arbustejaj-fajroj, brulo de arbaroj, kreskaĵoj de agroj, kampoj, savano-fajroj), polenoj, fungoj, bakterioj, kaj la fumoj kaj fulgoj devenantaj el homaj hejmoj, uzinoj ktp. hejtitaj per karbo, tergaso, nafto. Varmegaj vulkanaj gasoj venantaj en la atmosferon, vaporoj kaj 5000 C gradaj temperaturoj estiĝantaj dum atomeksplodigoj aŭ akcidentoj de atomcentraloj same kontribuas al la varmiĝo de la atmosfero. Menciinda estas ankaŭ la foruzo de la ŝtonkarbo kaj lignito, dum kiu procezo same signifa estas la liberiĝo de metano kaj ĝia enatmosferiĝo. Ekzameninte la kaŭzojn ankaŭ aliaj faktoroj aperas, kiam ni parolas pri protektaj eraroj de nia planedo. Tiuj estas:

La eligoj de damaĝaj materialoj, pro kiuj la aer-konsisto ŝanĝiĝas

Pro la superkresko de loĝantaro de Tero ĉiam pli granda teritorio estos enkonstruata, pro kio plimalmultiĝas la teritorio por la la subfiltriĝanta precipitaĵakvo

La grandmezure etendiĝantaj arbarpereigoj en intereso de plivastigo de la kultureblaj agroj, la anstataŭigo de la dehakitaj arboj per nove plantitaj, ne okazas, aŭ ne konvenmezure okazas.

Kiel eble la plej rapidan aranĝon bezonas la problemo de nukleaj defalaĵoj primaraj en la grundopoluciado, la damaĝaj akcesoraj produktaĵoj de la industrio (ekz: la ruĝa ŝlimo dum la aluminio-fabrikado), kaj la plej diversaj kemiaĵoj (ekz: la parte aŭ tute ne foruzitaj kolorigaĵoj, lakoj, acidoj), radioefikaj elementoj de telekomunikadaj iloj, malrapide malkombiniĝantaj sintezaj rubaĵoj, vitrorubaĵoj kaj similaj aĵoj.

14. INTERNACIAJ KONTRAKTOJ

Konsiderante la spertojn akiritajn dum la pasintaj dudek jaroj, por organizi la farendaĵojn, fondiĝis tn.: Klimato-ŝanĝiĝa Interregistara Kontrakto. Antaŭeniĝis la decidofaro interese de la komuna celo kaj konstato de la respondeco, akordigo de la pluaj taskoj kaj la raportigo pri la faritaj paŝoj. Bedaŭrinde pluraj landoj rifuzis subskribi la Kyoto- kontrakton; inter ili estas ankaŭ la Unuiĝintaj Ŝtatoj.

La Medioscienca Prezidenta Komisiono de la Hungara Scienca Akademio (MTA) en 2009. faris deklaron pri la klimatoŝanĝiĝo kaj la tiurilataj enlandaj taskoj. Ĉi tiu dokumento estis preparita surbaze de la rezultoj de la internaciaj kaj hungaiaj sciencaj esploroj. Kreiĝis Klimato-klubo (www.klimaklub.hu), Verduloj-klubo, Partio de Verduloj. En ties kadroj ankaŭ hungaraj sciencistoj agas kaj prezentas siajn starpunktojn pri la ĝis 2020 atendeblaj ŝanĝiĝoj, pri la utiligo de la disponeblaj energioj, bioenergio, sun- kaj ventoenergio, pri la lukto baziĝanta sur la komuna kunteno kontraŭ la klimatŝanĝiĝo, iniciatinte inter la gelernantoj la konscian medioamikan- medioprotektan vidmanieron. La Klimatŝanĝiĝa Skiza Kontrakto (Pakto) de UNo (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj /angle: FCCC/ en Rio de Janeiro estis oficialigita per subskriboj la 13-an de junio 1992. La konfirman dokumenton de la Hungara Respubliko oni registris ĉe la Ĝenerala Sekretario de UNo en 1994. Poste oni subskribis la Protokolon de Kyoto. En 2006 jam 188 landoj partoprenis la skizan pakton. En ĝia prilaboro ankaŭ Hungarujo partoprenis kaj aliĝis al la internacia pakto. (Vidu: La Debrecen-an Informilon de Medioprotektada Ministerio: eldonita en 2003: Internacia Kunlaboro al malpliigo de la klimatoŝanĝaj danĝeroj kaj eligadoj de emanoj de la forcejefikaj gasoj: www.ff3.hu/upload/KA-Klima.pdf)

Laŭ la klimatpolitika komisiito de Eŭropa Komisiono, la danĝeron de la klimatoŝanĝiĝo konfirmas la observoj, laŭ kiuj pro la fosiliaj hejtmaterialaĵoj, kaj la industria agado aŭ pere de la vulkanismo la enatmosferon iĝantaj sulfurdioksido kaj nitrata acido precipitiĝas en formo de acidaj pluvoj. La pli frue (en malvarmigaj aparatoj) uzita freongaso en la altan atmosferon iĝinte kondukis al maldikiĝo de la ozontavolo eksterordinare gravega por la tera vivo. Por solvi tiujn du gravajn problemojn naskiĝis la internaciaj kontraktoj bazigitaj sur sciencaj pruvoj, kaj pro iliaj bon-influaj finfaroj la solvoj de ambaŭ problemoj progresas en niaj tagoj.

15. NATURO KAJ MEDIOPROTEKTADO

Ekde sia apero sur la planedo, la homo laŭ siaj bezonoj transformis la naturon. Ĉi proceso ne estas haltigebla, ja la homo faras ĉion en interesoj de sia komforto kaj agrabligo de sia vivmedio. Sed tamen ni ne devas ignori, ke al la protekto de nia medio apartenas ankaŭ la naturprotektado. La pretendo de la naturprotektado tiam enfokusiĝas pli forte, kiam la homo

estiĝas atestanto de definitiva formorto de tiaj bestoj, kreskaĵoj, kiuj ĝis tiam estis integraj partoj estis nia vivularo, kiu pliriĉiĝis pere de ili.

Por mildigi ĉi tiun procezon, en 1935 estis kreita la unua naturprotekta leĝo, sed tiu laboro progresas malrapide. De tiam realiĝis ankaŭ en Hungarujo diversaj naturprotektaj distriktoj, Naciaj Parkoj, kiuj pro siaj raraj protektindaj bestoj, plantoj aŭ naturformacioj prezentas parton de la Monda-Heredaĵo. Ĉi tiuj estas niaregione la teritorio de Nacia Parko de montaro Bükk, en Kelemér la tn: Pramarĉaj-lagoj, la pra-arbedejo de juniperoj de Nacia Parko en Aggtelek. Sed protekton ĝuas ankaŭ la unikaj plantoj, la raraj arbospecioj kiuj troveblas en arbomuzeoj, botanikaj ĝardenoj, aŭ ili vivas sovaĝe. En nia regiono Nord-Hungario menciindaj estas sen pretendo de la senmankeco: la Hungara kolĉiko kaj la Stipo sur rokoj de Boldogkőváralja. En Slovakio sur flankoj de montaro Granda Fatro: troveblas la Orkido-specioj, kaj en la francaj Alpoj la sovaĝe kreskantaj Orkidoj kaj Azaleoj, kiujn ni povis admiri dum niaj ekskursoj.

16. RESPONDECO KAJ EBLECO

La variaj legitaj kaj aŭskultitaj oipinioj firmigis mian opinion, ke la klimatoŝanĝiĝo ne estas puno de Dio aŭ ekprovo de homo de li, nek la alveno de la Apokalipso, sed estas natura procezo de la historio de Tero. La nuna stato povos daŭri eĉ plurmiljarojn ĝis elformiĝo de la sekva, radikale malsimila klimato. Sed per haltigo aŭ moderigo de nia mediopoluciado ni povos havi dum longa tempo la konvenan teran vivmedion por niaj posteuloj.

Jen tio estas la vivkondiĉo kaj respondeco de nia specio sur la Tero. Nia Tero donas nian lulilon, nutraĵon, trinkaĵon, prosperon, la lokon, kien niaj proksimuloj enterigas niajn korpojn, cindrojn. La protekto de nia medio, vivloko por la pluvivo de nia specio nepre bezonatas, kaj tial estas neevitebla!

(La eseo premiitis per Honora mencio de Belarta Konkurso de UEA en 2011. Korektis: Jozefo Horváth, lektoris d-ro Endre Dudich)

Verdiro

„Ĉiu homo devas havi iun alvokiĝon; plenumeblan taskon sur ĉi tero. Ĝis la homo havas taskon vivas, kiam ne havas jam pli da, tiu mortas.”

/Albert Wass: Homo sur rando de la landvojo/

Pentraĵekspozicio por geblinduloj

La 9an de Novembro 2011a, kune kun mia edzo mi rigardis la ekspozicion de fingropinto palpeblaj pentraĵoj de s-ino Inka Romanek (Inka estas artistnomo de la hungara nomo Ilonka/Helena), en la Biblioteko de „Rákóczi Ferenc II-a" de Miskolc. La pentroartistino jene konfesas por la legantoj de nia retrevuo: „Kun mia patrina koro mi salutas la legantojn de ĉi paĝo kaj dankas, ke mi povas paroli pri mi, mia kariero, instigo. Ĉar ankaŭ mi bezonas plenumiĝon per nova forto, renoviĝo, kiujn certigas al mi la pentraĵ-prezentad-aranĝaĵoj, ja dume el ridetoj de la ĉeestantoj, el la amikaj manpremoj, babiladoj mi ĉerpas forton, persiston, vojmontron.
Ni bone scias, ke naskiĝante ni iĝas sur la „ĉentablon de la vivo", kie foj-foje forte ŝarĝatas nia ŝarĝeltena kapablo, tolerkapablo. Kontraŭ niaj klopodoj ofte okazas, ke ni devas forlasi nian agrable fluantan vivon por bone plenumi niajn intervenintajn novajn vivotaskojn. Same estiĝis mi „nestolasa"! Ja, mi estas agronomo kaj tiel mi laboris ĝis naskiĝo de mia filino. En miaj plej aŭdacaj sonĝoj mi estus ne pensinta, ke aperos iam de mi romanoj, aŭ mi havos pentraĵekspoziciojn. Jam de mia 20a jaraĝo mi sopiregis la patrinecon. Nekalkuleble multfoje mi preĝis al la ĉielanoj por estu ankaŭ mi patrino. Ŝajne mi estas „malfrue maturant-tipa", ĉar nur en mia 38a jaraĝo estis aŭditaj transmonde miaj petegoj. Animon entuziasmiga sento, nekreddebla ĝojo estis kiam mi sciiĝis, ke ankaŭ mi havas „ventroloĝanton". Mi timis pri ŝi, gardis mi ne kaŭzi malbonon por la tre atendita bebo. Ŝi estis „mia trezoro". Adél refutis la onidiron:" fartas bone, kiel en ventro de sia patrino." Ŝi naskiĝis komence de la 29a semajno de mia gravedo. Post multaj semajnoj rakontis la kuracistoj, ke ili reigis ŝin el stato de la klinika morto, kaj pri tio ŝi ricevis trifoje tutan sangoŝanĝon, forte luktante por vivigi la 1110 gramojn havantan animon. Je naskiĝo de mia filino mi ribelis kontraŭ mia vivo, kial mi ne povis finĝui la tutajn 9 montojn de mia gravedeco? Tion pensante ni portis hejmen mian filinon Adél, ke ŝi povos vidi. En ŝia 4a monata aĝo evidentiĝis, ke pro troe kvantigita dozo de oksigeno tiom grandmezure vundiĝis ŝiaj du okuloj, ke ankaŭ la serioj de operacioj ne redonis ŝian perditan vidkapablon… Mi proponis doni mian ĉion al Dio, nur mia Adél povu vivi, kaj mi sciu ĉiam pri ŝi kion kaj kiel fari en ŝia intereso. Dum multnoktoj larme mi suferis, timegis. Ĉu mi povos esti vere bona patrino ŝia, ĉar plifrue mi havis aferon neniam kun blinda homo. Mi atendis tian patrinecon, kian mi ricevis de mia patrino, kian mi vidis ĉe miaj fratino, amikinoj, kiujn mi vidis, spertis en mia ĉirkaŭaĵo. Dumtage mi parolis ĉiam al mia blindulineto. Mi deklamis, kantis al ŝi, bele ornamite deklamis la Nacian Kanton de Petőfi, la himnon de hungaroj, infanan diraĵon : „Boci-boci tarka… /Bovido - bovido bunta… ", fabelon pri la turka Mahometo… Adél unuajare jam diris etfrazojn, kaj kiel demandas ankaŭ la vidanta hometo, mia eta nevidanta homo demandis ties multoblon. Ŝi ofte etendis siajn etajn manojn: „Panjo, mi prenos Jezueton". Aŭ: Mi prenos la muzikon…ks." Ŝi petis kaj sciis, ke la panjo metos en ŝiajn manojn la nevideblan, nekonatan aĵon objekton. Komence mi preparis el kartono detranĉite kaj surgluate al kartono la erojn de ilustraj materialoj, kiuj estis longe la plej ŝatataj ludiloj de mia filino. Kun ili ŝi dormis, kun ili ni promenadis. Mi longe meditis kiel mi povu krei tiujn pli longdaŭraj, daŭremaj, temporezistaj, por montri ilin al ŝi ankaŭ en sia pli aĝa epoko. Tiel mi iris po gradoj al la pentrado. Kvinjaraĝe kiam ŝi demandis min konsterniĝvizaĝe, ke: ĉu vi samtempe vidas la riveron kaj la transbordajn domojn, arbojn, flugantajn birdojn? – vi povas imagi kion mi sentis!!! Pli frue ŝi pensis, ke ĉar ŝi perfingre samtempe nur unu aferon objekton povas „rigardi"- palpi, ankaŭ ni, la vidantaj homoj estas same! Al ADÉL per miaj pentraĵoj mi klarigis la mondon, ties admirojn, kaj mi kredis, kredas, ke ties kunhelpo mi povis, povas konstrui ŝian imagmondon, „vidigi" la velantan cikonion, la cervon blekegan sur la arbara kampo, la preĝejon de Kocsér/Koĉer/ kie ŝi estis baptita, ks.

Ŝi estas ne nur mia inspirantino, sed unu el miaj mendintoj! Dum longaj jaroj restis kun mi la malgajeco nevolante forlasi mian koron, sed ADÉL tamen montris al mi la vojon por trovi tiujn „fortojn" per kiuj laŭ miaj kapabloj, el mia patrina spirito mi povis krei la pli bonan, pli belan. Adél estas mia vera „malgajeco-foriganto", ja la de ŝi ricevita mia patrineco spertigis min pri tio, ke: jes ekzistas kreanta sufero sed ankaŭ tio: se vi volas ion vere purakore, la sorto ne fermas la pordojn antaŭ vi. *Mi scias. Mi bone scias, ke malfacila estas la povo". Ne estas facila afero vivi kiel „blankbastonulino", sed same malfacila estas la situacio de la patrino de la „blanka-bastonulino", sed mi konfesas: mi neniam povas rigardi nin kiel finitan kreaĵon de la Dio! Nia estonto, niaj ebloj, ŝancoj staras antaŭ ni, ni neniam tombigu niajn sonĝojn, sopirojn!*

Dio kreis la mondon por ni ĉiuj! Kvankam vi povas naskiĝi kun alieco, aŭdo-traŭmate, movad-reduktite kun okulproblemoj, sed se sufiĉe da KREDO, AMO, PERSISTO, FORTA VOLO kaj CELKONSCIO estas en ni, ni povas tamen plenumi nian mision, ni povas bone senti nin en nia korpo, mondo.

En intereso de nia filino ni translokiĝis al Budapeŝto. ADÉL iris tie en infanĝardenon, tie finis ŝi la bazlernejon. Ĉijare (en 2011) ŝi eminente abiturentekzamenis kaj atingante 440 punktojn ŝi estis enskribita por lerni al la de ŝi tre sopirata Komunikada kaj Medioscienca fako de la Budapeŝta Komunikacia kaj Komerca Altlernejo. Mi estas ŝia „laŭta libro", mi legas al ŝi multegajn literaturaĵojn, inter kiuj ŝi valore kaj diligente lernas, memstare trafikas, orientiĝas, informiĝas.

Miajn pentraĵojn ĉiukaze mi pentras al tolo antaŭe prilaborita per glitigitaĵo, por ke ĝi povu fari ebla al la „rigardadoj" per la fingro-kropo (la pinta vianda parto sub la ungoosto), por ke ĝi ne kreviĝu pro la palpadoj, ne rompiĝu la tolo, kaj ankaŭ ne la dike surportita kolorigaĵo. La enŝtopado de la tol-truoj (la kovro, la kaŝo de la truoj) estigas ne disigeblan ligon inter la tolo + la lignofabrika plako, iu specia glumaniero, plej ofte aplikita ligfarbo estas al tiu procedo: la gluaĵo. Pri la gluaĵo pli multe mi ne scias, sed mi scias tiom, ke mi povas ĝin kaj varme kaj malvarmstate surporti la tolon sur iun fiksa rigida plako. Tiun laboron mi faras ĉiam antaŭ komence de la pentro, sed ĝenerale mi aĉetas /pretpreparigite ĝin al la de mi dezirata tolmezuro/ en la butiko. Do, „nuda" estas mia antaŭpreparita tolo, kiam mi komencas "plenigi, vivigi" ĝin.

La specialan kolorigaĵon mi portas sur la tolon per plurtavoloj atendante la sekiĝon de unu, poste denove unu tavolo, kaj same mi konstruas plu, kaj plej fine mi lakigas la pentraĵon. Mia ADÉL ĵurias ĝin unue, plejmultokaze ŝi estas la titoldonanto, kion ĉiukaze mi surbildigas per kolorigaĵo kaj pere de brailskribo.

Miaj koloroj estas intence malmolaj, ke la apenaŭ vidantuloj, kiuj havas iom da vidkapalo por vidi kolorojn, ankaŭ tiuj rekoneblu kolorojn de miaj pentraĵoj… Miajn skrib- kaj pentrilojn mi mergas en mian dolĉpatrinan animon, de tie mi pentras miajn sentojn, pensojn. Mi sopiras, ke per miaj pentraĵoj ne nur al mia filino, sed ankaŭ al ŝiaj samsortanoj mi povu doni travivaĵon, ja ankaŭ la blinda homo havas pretendon al la belo, ke tiu povu klarigi, preni, vidi spirite la objektojn, kiuj faras ĉirkaŭ si la atmosferon de konfido. Ĝojo estas por mi, se la vidjapabluloj tempopasigas ĉe niaj ekspozicioj, kaj ni kredas ilian komprenon kaj ke ili eksentas ties mesaĝon, ja la kolormondo de la bildoj faras ankaŭ al ili ĝueblan vidindaĵon, kaj kiel mia ADÉLKA esprimis sin klare: **„Estu ili pontetoj inter la vidantoj kaj nevidantoj.Tiaj**

pontetoj estu ili, kie la amo, la kredo kaj la atento unu sur la alia, la helpo estas la vera ten-pilieroj."

Benu Dio viajn paŝojn, donu sanon, plenumu viajn dezirojn. Mi adiaŭas: ĝis la revido:

www.romanek.gmail.com

Miskolc, la 9an de Novembro 2011. Estimplene: s-ino Inka Romanek"

Pri la fama evento informis s-ino Adrienne Pásztor

Meditmeritaj konkludoj

La sorto aranĝas la aferojn laŭ propra imago kaj priatentas neniun.

Preskaŭ ĉiuj viroj komencas verki siajn memorindaĵojn, sed malmulte da ili finas tiujn.

La feliĉo samaspektas kiel la aero, rimarkeblas nur ĝia manko.

Nenies eston pensu manko el via pasinto! Tiu certe havas bonkaŭzon ne ĉeesti en via estonto!

Inter du homoj la plej mallonga vojo estas ĉiam la rideto!

Je ilia maljunaĝo la geedzoj devas gardi nur unun: unu la alian!

/Ilian hungarlingvan tekston sendis Teodor Adreas, esperantigis la EAR „Király Lajos"/

Funebro

Forpasis d-ro Sándor Szénási (1923-2012), delegito de UEA. Paco estu kun li. Diobeno akompanu lin, kiun kvankam mi ne konis, sed aŭdis, ke li estis saĝa kaj tre bonkora homo.

S-ino Adrienne Pásztor

Karlo Sziklavári

Operludoj en Miskolc dum la dua duono de la dudeka jarcento

\- Daŭrigo –

Parto IV-a

Du sezonoj: 1954/55; 1955/56

Premiero de la Rigoleto okazis en la Teatro „Déryné" la 10-an de Decembro en 1954. La kritiko rekonis pliboniĝon de la aktora laborprovumo de la kantistoj, kio estas dankebla al laboro de reĝisoro Georgo Orosz. /Ornamaĵo estis de: Georgo Blanár, kostumo: Margareta Mészáros, koreografo: Zoltán Bodrogi, masko: Danielo Madácsi. La prezenton direktis Petro Mura, parton de la pli

malfruaj teatraĵoj direktis Frederiko Róna. Kritiko: tagĵurnalo Norda Hungarujo,19. Decembro 1954., kaj revuo „Széphalom" 1955/1./ La teatraĵo estis pli altnivela, kompare al la ĝistiamaj prezentoj de opedroj, spite al la malfacilaĵoj de la aktoraro. Suzana Lády el Debrecen sukcese debutis en rolo de Gilda; Maria Király interpretis la rolon de Maddalena; Emeriko Páloŝ debutis kiel princo de Mantova kaj ĉefe Julio Littay rikoltis sukceson kiel Rigoleto. Littay evoluis ege rapide, pro tio printempe de 1957 li jam povis roli Rigoleton en la Ŝtata Operejo kiel gasto kaj ege sukcese. /Teatraj vesperoj de Miskolc-1956-57/5./

Same elstara prezentado de la mallongviva Miŝkolca opergrupo estis; la „Papilio-fraŭlino", kiu estis la alia operprezento de la sezono 1954/55-a. /Reĝisoris Georgo Orosz, ornamaĵo preparita de: Gabrielo Forrai, kostumo de Margareta Mészáros, korus-direktisto estis: Zoltán Szotyori, la orkestron direktis Petro Mura. Kritiko verkita en la tagĵurnalo Norda Hungarujo 23.. Majo de1955/ . De la 20-a de Majo 1955 ĝi troviĝis en la programo - akompanante kun nekutime vigla interesiĝo - sekve de tio ĝi restis ankaŭ en la repertuaro en sekva sezono, poste en Aprilo de 1957 ĝi estis renovigita. Aktorino Tereza Komlóssy en la titol-rolo estis dungita al Teatro de Miskolc - de la Opereto-Teatro de Budapeŝto, - kiu estis grava rolantino multajn jarojn por la teatraj prezentoj. Dum la premiero same elstaran kantistan plenumon donis Emeriko Pálos (Pinkertono), Julio Littay (Sharplesso) kaj Maria Kabdebo (Suzuki). En januaro de 1956 oni surscenigis la teatraĵon ankaŭ en Eger. /Kritiko el: *Popolgazeto de Departemento Heves-7*. Januaro de 1956. La ĉefrolon kantis Lili Neményi en Eger, la aliaj kunrolantoj estis anoj de aktoraro de Miskolc./

Kampe de la repertuaro la sezono 1955/56-a faris omaĝon unuavice al verkoj de Puccini (Papilio fraŭlino, Tosca), pli malmulte al (Trobadoro de sia renovigo) arto de Verdi; tiel entute vidante ĝi estiĝis malpli varia ol la oferto de la antaŭa sezono. Sed en la jaro 1956-a,lige al la ducent jara jubileo pri Mozart, origine oni planis ankaŭ prezenton de la „Geedziĝo de Barbiro".) /"Norda Hungario"-7. Septembro 1955./ La „Tosca"estis surscenigita la 10-an de Januaro en 1956. Ĝi estis eksterordinara okazintaĵo: ĝi estis la unua diplomo laboro de juna kandidato Zoltán Horváth por esti reĝisoro kaj samokaze ĝi estis la unua reĝisora ekzameno de opero en la lando. /Teatraj vesperoj de Miskolc,1955-56/1. Ornamaĵo estis de: Antono Suki, kostumo de: Margareta Mészáros, ĥor-direktisto estis: Zoltán Szotyori, direktis la orkestron Petro Mura. Kritiko de la tagĵurnalo: *Norda Hungario* – 26.jan.1956./ En la titol-rolo la aktorino Eva Harmath el Szeged debutis; Julio Littay montris la de li kutiman povumon kiel Scarpia. En rolo de Cavaradossi Tibor Pászti el Kecskemét rolis anstataŭ la subite malsaniĝinta Emeriko Páloŝ. Ĉi tiu teatraĵo estis enprograme ĝis aprilo, poste oni renovigis la Trobadoron.

Ĉar eblecoj de la miŝkolca aktoraro estis malvastaj, somere kaj komence de la aŭtuno okazis gastoroloj, kiuj vigligis la opervivon de Miskolc. Ensemblo de la Operdomo okaze de sia enlanda migrado prezentis du teatraĵojn: la 28-an de Julio „Vesperto"-n kaj la 29-an de julio „Traviata"-n, en la subĉiela scenejo de Popolĝardeno de Miskolc. La popularan ĉefverkon de Verdi – pro ĝia multekosteco - ne povis prezenti la malgrandigita Miŝkolca aktoraro. Sed la certgrada unuflankeco de ilia repertuaro ne estis eraro nur de la loka aktoraro de la operludado. Ja ensemblo suferis pro la ŝarĝoj de la „racionaligado", poste ĝi devis funkcii de la sekva sezono eksterteatre.

La malplenigita teatrokonstruaĵo ne povis doni hejmon eĉ al teatraĵo „Don Giovanni" de Ŝtata Teatro de Kassa (Košice en nuna Slovakio) la 12-14-an de oktobro 1956. Per sia vizito la alilanda aktoraro reciprokis la kelkmonate plifruan gastrolon de la Miŝkolcanoj: la revivigo de la tradicie fruktodonaj kontaktoj – kaj nur pro la dudekjarcentaj politikaj sekvaĵoj rompiĝintaj - tiam okazintaj. Se ni povas kredi al la gazetaro, tiam vizito de la Kassa-anoj estis pli aventura, ol tiu de la Vojaĝanta Opero. Nome kiam la Kassa-anoj malfruante alvenis al la Kulturdomo de la Ferfabriko, ili surpriziĝis pro la proprecoj de la tiea ludejo. La 12-an de oktobro ne je la 8-a, sed ĉirkaŭ la horo 9,30 povis komenciĝi la rolado, sed laŭ la kritiko la aktoraro ne estis laca. /„Norda Hungarujo" 14. okt.1956. La teatro de Košice programis la operon prezenti okaze de la Mozart-bicentenario. En Diósgyőr, ili prezentis ankaŭ unu slovakan baleton./ Dum la antaŭrevoluciaj monatoj en pli ekscitita publikviva atmosfero jam multĉio povis ricevi

publikecon, kiuj estis plifrue senimageblaj. Pro tio Petro Mura kaj Frederiko Róna, dirigentoj de la Teatro de Miskolc postulis en dramvoĉa artikolo restitui la originalan nombron de la geaktoroj, same kiel estis antaŭe en aŭgusto de 1954. / tiu artikolo aperis en revuo „*Művelt Nép*" /*Klerita popolo*/- 20. majo 1956./ Planoj de Petro Mura estis pli aŭdacaj, ĉar li havis pli grandan celon, ol kiun apogintus kiel logika argumento pri evoluigo de la regiono: li volis, ke la dua urbo de la lando estu la dua opercentro de la lando. Li prilaboris longdistancan proponon koncerne de la Miŝkolca operludo dum junio de 1956. Liajn pensojn servis modele la oper-kaj baletoensemblo de industriregiono de Silezio, (havante 350 membrojn kune kun la prozaj sekcioj, kaj provizitaj estis per ses aŭtobusoj al siaj vojaĝoj) bone organizita, taŭga por kontentigi pretendojn de pluraj urboj. Se liaj planoj povus realiĝi kun similsisteme la Teatro de Miskolc estus povinta ludi en Kazincbarcika, Ózd, aŭ en la minist-setlejoj. Jen liaj publikitaj tabeloj, kies numeroj montras la evoluigon jare.
/Ĝi aperis en revuo „Nova muzika bulteno" 1956/7-8. okaze de tutlanda forumo, kiu konsideras nian muzikan kulturon, detale emfazante la planojn/

Jaro	Orkestro	Kantoĥoro	Dancensemblo	Solkantistoj
1956	32	20	8	5
1957	50	32	12	10
1958	60	40	20	13
1959	70	44	24	16
1960	70	48	30	20

Jaro	Opero	Opereto	Baleto	Koncerto	Sume
1956	40	260	-	-	300
1957	60	250	15	60	385
1958	75	250	30	80	435
1959	90	230	40	100	460
1960	100	220	50	110	480

Admirinde belaj ideoj: sekvu sam-mezura disvolvigo de la kultura vivo la evoluigon al grandurbo de Miskolc, pase de kelkaj jaroj pojare per cent opervesperoj! Ilin ni povas rigardi tipa manifestiĝo de iu sorta sed esperplena tempospaco, iom da dono el ties svarmaj ĉiutagoj. Similajn pensojn ankaŭ aliuloj surskribis tiutempe. /Solv-frazo povus esti de tiuj ĉi flugantaj monatoj, la suba penso el la publikigita artikolo de Aleksandro Bihari, titolita „Galantino de Miskolc" famiĝinta (kaj veran lavangon ekmovanta): „Se nia urbo estas la dua urbo de la lando, kial ne povas esti ni inter la unuaj en la ĝenerala evoluo?" (Revuo „Klerita popolo-17. Junio. 1956.) Sinesprimojn kaj filipikon ni povas legi en numeroj: la 29a de Julio 1956, la 26a de Aŭgusto, la 2a, 9a, 16a, 23a de Septembro, kaj en la 21a de Oktobro 1956 de la revuo „Klerita popolo", kiuj estas eksterordinare koloraj epokdokumentoj.) Unu Miŝkolca centro de ĉi tiu renoviĝinta publikviva atmosfero estiĝis la Kafejo de Avaŝ, nomita per la intelektularo „PILVAX"/Pilvakso. Loka grupo de Asocio de Verkistoj estis avangarda per sia spirito aŭdaca kaj nekutima inter la volantaj novon (pri kio povas doni bildon krom kelkaj samepokaj gazetartikoloj, la aŭtune de 1956 aperintaj kvar numeroj de la revuo Kilátó/Elvidejo.)
Sed en ties artikoloj koncernaj al teatro, ĉio-ĉi certiĝis jam iluzia. En Miskolc ne nur la demando de teatra ludejo iĝis sensolvebla de aŭtuno de 1956, sed, - ekde komenco same kiel en Debrecen, aŭ Pécs – ankaŭ apud la malindaj loĝejcirkonstancoj ankaŭ la salajro-problemoj de geaktoroj, muzikistojplimultigis la damaĝojn (ili loĝis en nekomfortaj, subluataj ĉambroj, kiuj estis multekostegaj, ilia honorario estis bagatela ero de honorario de la ĉefurbaj aktoroj. (Vidu la kompilaĵon titolitan: *Dokumentoj al historio de hungara muzikvivo 1945-56,* IIan. volumon, 60.

numeran dokumenton. Laŭ la petskribaĵa teksto meze de la 1950-aj jaroj la Miŝkolcaj subluataj ĉambroj estis la plej multekostaj landskale.) Jam okazis mencio pri ilia faka evoluo en teksto de ĉi eseo. Ilia arta disvolviĝo renkontis ankaŭ aliajn malfacilaĵojn: la malpliigo de nombro de orkestro de la teatro somere en 1954, (ĉar la ensemblo principe estis destinita por plenumi primaran rolon de koncertvivo de la urbo), kiu ne bone efikis ankaŭ al la koncertroladoj, koncertdebutoj de la privataj kantistoj. Pro ĉi tiuj cirkonstancoj apenaŭ estis aktoroj ne lasantaj la duban Miŝkolcan teatron je la estiĝanta unua fojo, al pli promesplena ebleco por la aktorado. (Kiajn eblecojn donis la ĉi tiel funkciigita teatro de Miskolc por gelernantoj, finante studojn de la muzikarta faklernejo? Pri ĉi tio ne estas inda por paroli; efike de ĉi tiuj fortiĝis la formigrada tendenco de la muzikistoj en tiu ĉi tempo.) La problemoj multobliĝis, kaj estis nur demando de la tempo, ke la elloĝigita, poste al aŭtuno de 1956 plorinde malriĉiĝinta teatro de Miskolc kiam ricevos la krizan pikon malbeligate sian muzikan fizionomion.

Parto V-a

La 1956/1957. sezono

Ne rigardante la teatro-ludejajn statojn, entute tamen entuziasmige komenciĝis la 1956/57a sezono, ĉar de Septembro de la Urba Konsilio la teatro sukcesis reakiri sian originalan etaton antaŭanta la regresigon; mildefikis plie al la plej maltrankviliga zorgo de la regioneco: la 15 procenta altigo de salajroj de la artistoj (per kio ilia salajro ne atingis tion de la ĉefurbanoj, sed iom proksimiĝis al tiu.). Tiu sezon-komenco kunportis multe pli longajn distancajn operplanojn de la pli fruaj: „*Honoro de kamparano", „Bajazzoj", „Aljeko*" de Rahmanjinov, *„László Hunyadi"* (sur scenejo de de la Kulturdomo de la Ferfabriko:) „*Fuĝigo el la serajlo"* (iomete malfruante, sed okaze la 200a naskiĝdata datreveno de la aŭtoro), *Fra Diavolo* de Auber aŭ *Don Pasquale* de Donizetti (la pli lastaj okazis en la Ĉambro-teatro). Pritemis ankaŭ la ebleco de resurscenigo de „*Rigoleto"* kaj la „*Vendata fianĉino"*. Kiel signoj de esperplena arta refreŝiĝo montriĝis la planitaj premieroj, (de la plialtigit-nombra danĉoro provizita per persono de la baletomajstro Tibor Téry) inter kies premieroj estis la „*Franca salato*" de Milhaud; de Bartók: „*Admirinda mandareno.* (Pri ĉiuj ĉi vidu la tagĵurnalon *Norda Hungarujo* la25-an de .Aŭgusto 1956. krome vidu numerojn de la *Teatraj vesperoj de Miskolc* 1956/57-1., aldirante, ke dum la antaŭa sezono inter la pli longdistancaj imagoj rolis la programigo de „*Johano Hary"* de Zoltan Kodály; vidu la artikolon de la ĉefreĝisoro Karlo Kazimir, en la numero 1955/4-a de la revuo Széphalom.) Oni dungis novajn solistojn el Kolozsvár (Cluj en Rumanio): la basulo Géza Püllök, debutis la 20-an de Oktobro dum prezento de „*Tosca";* poste la 29-an de Decembro Irena Kovats eksonigis la ĉefrolon de teatraĵo de Puccini.

Sed eventoj de la ceteraj monatoj radikale aliigis la laboron kaj estonton de la teatro. Ĉar la teatraj prezentoj paŭzis dum plursemajnoj, fiaskis ankaŭ la programitaj prezentadoj. Je la 9a de Decembro - en formo de surstrataj protestoj popolaj korpiĝante - denove ekflamiĝis la kolero de popolo, pro tio la tiutaga teatraĵo ĉesis. Validigita estis la elir-malpermeso kaj la ferfabrika agado de la instituto povis daŭriĝi nur la 29-an de Decembro per la prezento de la teatraĵo „*Tosca"*. Post tio dum unu kaj duono da monatoj oni ne aranĝeblis prezenton de opero en la urbo, ĝis prezento la 12-an de Februaro, de la teatraĵo „*Fuĝigo el la serajlo"* en la Ĉambro-Teatro. Ne hazarde; en la altrudita situacio la instituto apenaŭ povis permesi por mem la establadon de la plej multekostaj specoj de la publikaj prezentaĵoj. Rilate al siaj ebloj la teatro troviĝis ĵus en la kontraŭa ekstremo al monatoj de la vintro, kiuj multe pli malgajaj estis ol la kutimaj, kiajn la teatro planis preta por la renoviĝo, dum la svarma fruaŭtuno. La ŝtata subvencio refalis al fragmento de la kutima magnituda ordo je fino de 1956. La situacio vere dramis. Al funkcio de la teatro ekstera helpo estis bezonata, la frata instituto de Kaŝŝa gravajn kaj valorajn rekvizitojn sendis al Miskolc dum Decembro. (La taga ĵurnalo Norda Hungarujo, nro7a de Decembro en 1956; Gazeto: Teatraj vesperoj de Miskolc, nro: 1956-57/2) Atente al la esenco, la statoj tute ne pliboniĝis al komenco de 1957. La letero de direktoro Tibor Mészőly adresita al la

ukraina Teatro Ivan Franko, konsistiganta petojn pri konkretaj objektoj (kurtenoj, materialoj teksilaj kaj lignaj, kostumoj) estas kortuŝa dokumento. (La nedatigita plano de la sendita letero devenas de la unua duono de la jaro 1957 kaj troveblas en Miskolc ĉe la Arkivejo de Departamento Borŝod-Abauj-Zemplén, fond. VIII.701/c. (miksaj dokumentoj/ 1953-61).

Inter ĉi tiuj cirkonstancoj okazis la unua prezento de la „*Fuĝigo….”* en Februaro de 1957. (Reĝisoris Zoltan Horváth, ornamaĵo de Endre Ütő, pri la kostumoj zorgis Piroŝka Katona, faka direktoro estis Paŭlo Kardoŝ , direktis Ervin Lukács. Kritiko: el la tagĵurnalo „Norda Hungarujo la 20a de Februaro de 1957) La publiko de Miskolc povis vidi en la Ĉambra-Teatro dek teatrajn prezentojn de opero de Mozart, poste ĝian prezenton povis ĝui la publiko de Miskolc en la Ferfabrika Kulturdomo de la urbo, ĝis fino de la sezono. Ankaŭ en la provinco ĉeestis la publika prezentaĵo: la Miŝkolca opera trupo unue veturis kun ĉi tiu teatraĵo al la kulturdomo de ministoj de Alberttelep. (Vidu la anoncon pri ĝi en la Teatraj Vesperoj en Miskolc, 1956-57/5) Intertempe gravaj ŝanĝoj okazis en la direktado de la teatraj muzikistoj; komence de 1957 Ervin Lukács estiĝis la dirigento anstataŭ Petro Mura. La ĥoron direktis jam ekde aŭtuno de 1956, la juna ambicio plena korusa direktoro Paŭlo Kardoŝ, la plifrua instruisto de la muzikarta faklernejo (lia nomo poste estiĝis kulmino en la fako pri korus-direktisto.) Ankaŭ novaj kantistoj prezentis sin dum la prezentadoj de *„Fuĝigo…”* (en rolo de *Constanza)* sinjorino Magda Marŝay, tiel same prezentis sin Ŝtefi Károlyi *(Blonde)* en opera rolo. La plej faman voĉon de la teatra verko kantis alterne Géza Püllök kaj Andreo Bottyán.

Senŝanĝe per planoj aspirantaj alten pasis la printempaj monatoj de 1957. (Por si mem parolas la priskribaĵo verkita de la oper-reĝisoro Zoltan Horváth, publikigita en la gazeto Teatraj Vesperoj en Miskolc, 1956-57/4. titolita „Antaŭ realigo de la belegaj planoj! Oni programis al Aprilo la prezentojn de „*Honoro de kamparano” kaj „Bajazzoj*” (kadritaj al la sama vespero), laŭ la planoj al fino de la sezono ilin estus sekvinta la premieroj de la „*Maskobalo” kaj „Don Pasquale”.* La baleto artistoj de la teatro prepariĝis por prezenti memstaran publikan prezentaĵon - unuafoje - pri la sekvaj teatraĵoj: *Pupo feino*: de Bayer, *Animo de rozujo:* de Weber-Berlioz, *Bolero:* de Ravel. La pli postaj estis prezentitaj antaŭ la publiko dum Aprilo, kiuj pliriĉigis artan fizionomion de la teatro.

La Kulturdomo de la Ferfabriko donis lokon por la finaj duoblaj prezentoj de opera trupo de Miskolc, la 25-an de Majo en 1957 *„Honoro de kamparano*” kaj *„Bajazzoj”.* (Reĝisoris tiujn Zoltan Horváth, dekoracio de Antono Suki, kostumo de Piroŝka Katona, direktis Ervin Lukács. Laŭ atestoj de la teatraj afiŝoj oni planis la unuan prezenton unue al je la 19a de Majo, poste 23-a de Majo, fine ĝi okazis la 25-an de Majo. Kritikoj el la tagĵurnalo Norda Hungarujo, 31a Majo de 1957 kaj la revuo „Filmo-Teatro-Muziko” la 7a de Junio.) Kiel ni povis sperti ĉe planoj de sezono 1954/55a., malnovaj realoj realiĝis per la surscenigoj de la du malgrandaj operoj. La prezentojn Maj-finajn kaj Junio komencajn, okazigitajn en Diósgyőr, sekvis ankaŭ aliaj en Julio sur Subĉiela Sceno de la Popolĝardeno, kadre de unu freŝe ekvojaĝigita kultura serio de aranĝaĵoj: la Festaj Semajnoj de Miskolc. Ĝia kreanto; direktoro de la teatro Tibor Mészöly rekonis jam en 1957, ke la naturmediaj cirkonstancoj de la urbo bone utiligeblas por aranĝi festivalon. (Vidu la intervjuon, faritan kun li porkaze, en numero 1956/57/6a de la gazeto „Teatraj vesperoj en Miskolc") La serio de aranĝaĵoj estus servinta rekte la rekonstruon de la teatro. Jen sinjoro Mészöly vane faris ĉion por sukcesigi tiun ĉi aferon, ĉar la instituto havis grandegan deficiton, pro kio li baldaŭe devis foriri de la teatro. (La Festaj Semajnoj de Miskolc vivis nur unu jaron.)

Laŭ la ĝeneralaj opinioj la sonado de la ĥoro estiĝis nekompareble multe plibona ekde prezento de la „*Trobadoro”* (danko al laboro de Paŭlo Kardoŝ) ĉar ĝi estis antaŭkondiĉo de prezento de „*Honoro de kamparano.”* Post foriro de Emeriko Páloŝ ne ĉeestis taŭga tenoro, kiu povus esti prezentinta voĉon de Turiddu, pro tio oni devis dungigi al gastoludoj Aleksandron Király (de la Ŝtata Operdomo). Apud li dum la duobla prezento donis elstarajn kantistajn plenumojn Irena Kovats (*Santuzza),* Julio Littay (*Alfio, Tonio*), kaj Tereza Komlossy *(Nedda*).

Parto VI-a

Sezono 1957/1958.

Komence de la sezono persono de Paŭlo Jákó iĝis la nova direktoro de la instituto, Vilhelmo Rubányi iĝis la muzika estro, havante jam konsiderindajn regionajn spertojn. Jákó deklaris al la gazeto „Filmo-Teatro-Muziko"- fondita antaŭ nelonge kaj kompare al la epokaj rilatoj havante sanan spiriton – la sekvajn: „La teatra trupo havos aparte ankaŭ sekciojn operan kaj baletan kaj ni ŝatus prezenti unu originalan hungaran operon, al kies verko ni donis jam komision al unu el inter niaj elstaraj komponistoj. Temo de la opero estas unu legendo de Miskolc (23. Aŭgusto de 1957.) /Dek tagojn pli poste la tagĵurnalo „Norda Hungarujo" anoncis publike la programoplanoj de Jákó (30. Aŭgusto): laŭ kiuj la direktoro planis operprezenton en ĉiuj ĵaŭdoj de la nova sezono. Krom teno en repertuaro de la malnovaj teatraĵoj, li celis prezenti je la 14-a de Novembro la teatraĵon „*Don Pasquale"* kaj pli malfrue la teatraĵojn *Lakmé, Maskobalo, Traviata*, (menciante ankaŭ plurajn publikajn prezentaĵojn pri baletoj). Li sendis proponon al la ministerio pri planataj reciprokaj duflankaj vizitkontaktoj kun urbanoj de Kaŝŝa (Koŝice) kaj en aferoj de gastroloj Karpatukrainaj. (Laŭ la dato la 9a de Septembro en 1957. Borŝod-Abauj-Zemplén Departementa Arkivo, fond, VIII.701(C. miksaj dokumentoj, 1953-61.) La reputacia operkulturo de Kaŝŝa vere estus bonefikinta al evoluo de la teatra trupo de Miskolc, helpe de ĉi planita kunago: „Ankoraŭ en Julio, la teatro de urbo Kaŝŝa turniĝis al la Nacia Teatro de Miskolc per nova propono, en kio proponata estis, ke en la sekva sezono la du teatroj enkonduku reciprokajn interŝanĝojn de dirigentoj kaj solo kantistoj. Niaparte – kaj tio kongruas kun opinio de la Urba Konsilio de Miskolc - ni ŝatus eĉ plie larĝigi tiun ĉi gastoŝanĝon.. S-ro Jákó certe fidis je siaj kontaktoj pere de kiuj li esperis monon: tiel povis koncipiĝi en li la plupensataj ideoj de unu nova, Miskolc-tema opero, la sistemaj operludoj poĵaŭdaj, aŭ la ŝanĝoj de dirigentoj kaj solkantistoj de Kaŝŝa-Miŝkolc. S-ro Jákó certe fidis je siaj kontaktoj pere de kiuj li esperis monon: tiel povis koncipiĝi en li la plu pensataj ideoj de unu novaopero tema pri Miskolc, la sistemaj operludoj po ĉiu ĵaŭdaj, aŭ la ŝanĝoj de dirigentoj kaj solo kantistoj de Kaŝŝa-Miŝkolc. Li ricevis ĝian kontraŭon. En Diósgyőr (Dioŝdjor) nur du publikaj prezentaĵoj de la *Fuĝigo el la serajlo*, plue la du regionaj prezentoj de la Bajazzoj sufiĉis el forto de la teatra trupo de Miskolc en 1957. (*Fuĝiĝo el la serajlo*, 17.Oktobro.1957, 16. Novembro; *Bajazzoj* (ambaŭfoje kune kun la baleto *Ŝeherezade*): 20. Septembro Sátoraljaujhely 28. Septembro: Ózd; laŭ atesto de la libreto de teatraj provludoj. Pri interesa plano komunikas famon en 1957, la 15-30. Novembra numero de la Program-informilo de Miskolc (paĝo 15.): laŭ tiu de 24. Novembro. La teatra trupo planas al ĉiu dimanĉa antaŭtagmezo popularajn, miksajn kompilit-programajn opero matineojn en la Ĉambrego-Teatro, dezirante doni novaĵon al la opero ŝatantoj de Miskolc". La itala programo anoncita al la 24a de Novembro estis planita konsisti detalojn el operoj de Verdi (*Rigoletto, Traviata, Trobadoro, Potenco de la fatalo, Aida, Maskobalo, Otelo, el la Aida la tuta eksono de la sceno sur bordo de Nilo*). Oni planis al a 1-a de Decembro francan programon (*Carmen, Rakontoj de Hoffmann, Faust, Ŝamŝono kaj Delila,* per detaloj de *Lakmé*)

Anstataŭ la prezento de „*Fuĝigo…,* anoncita - originale al la 24-a de Novembro - aperis en la tagĵurnalo „Norda Hungarujo"samtage artikolo koncerne la fakton de la opero-ludado de Miskolc. La artikolo oficiale komunikis la konsterniĝan famon, kiu jam ekde multaj tagoj okupis intelektulojn de urbo: je iniciato de la Ministerio oni malpliigas grandmezure la postenojn de la Nacia Teatro de Miskolc kaj provizore ĉesigas la funkciadon de la opera trupo, ĝis pretiĝos la renovigo de la teatro. Kun bombastaj promesoj, (laŭ kiuj ili faras ĉion en intereso de rapidigo de la konstruaj laboroj) oni strebis plibeligi la depriman enhavon.

Sed la menciitaj restis nur malplenaj frazoj: same pri la trakonstruo de la teatro kaj koncerne la reorganizo de la opero-trupo. Pere de la 1957 jara ĉesiĝo de funkciado, realiĝis la iamaj sonĝoj de la ministerio de la pli malbona duono de tiu malbela jardeko, rilate la sorton de la opera ludado en Miskolc. La funkciuloj de jaro de la post revolucia partia ŝtato, la kompetentuloj de la departemento, la urbestraro en ĝoja konsento likvidis la opero-kulturon de la dua plej granda setlejo de la lando, granda laŭ la nombro de la loĝantoj. Dum pli bonaj tempoj la urbo oferas al la kleriĝo: ekzemple tiel, ke ĝi levas teatron (Miskolc 1819-23); sed la malindaj centraj kaj lokaj gvidantoj de la jaro 1957a, klopodis pri la ĉesigo de la teatro. Post kiam oni devigis foriri 40 homojn, (preskaŭ la 20% de la tuta nombro de la personaro,

dek unu solkantistoj inter ili) la sezono 1957/1958a pasis for (rigardante la muzikajn teatraĵojn) per la operet-dumpingo el ĉiuj vidpunktoj malaltprezajn amuziĝ-formojn dona. Aferon de la oper-ludado de Miskolc, tiutempe protektis la landa gazetaro – sed vane. (En kolumnoj de gazeto „Vivo kaj Literaturo” per titolo „Tri ĝemetoj de Miskolc”, en Decembro de 1957. aperintan vek-voĉan artikolon de Georgo Hárŝ ni komunikos kiel suplementon de ĉi eseo.

(Vidu krome la amaran ironio plenan skribaĵon de Miĥelo Ladányi sub titolo „Teatra promeno en Miskolc”, aperinta en la ĵurnalo „Hungara Nacio” en numero la 27-a de Novembro en 1957. Dum Septembro de 1958 ankaŭ sur kolumnoj de la periodaĵo „Muziko” aperis artikolo, urĝiga la renovigon de la oper-ludado de Miskolc.)

/ Daŭrigo sekvos /

Ŝercoj

Kiu estas la vere maljuna piloto?

Tiu, por kiu komence la flug-metio, la flugado danĝeris kaj ne la sekso.

Nov-geedzoj

La nova edzo demandas sian edzinon:

Karegulino mia! Per kio vi farĉis ĉi kokinon?

La edzino:

Per nenio, ja ĝi ne estis malplena!

Du pomoj

Du pomoj rigardadas suben al la mondo. Unu ekvoĉas:

Ĉu vi vidas la homojn? Mortigas, murdas, rabas unu la alian. Se tio same fluos plu, nur ni pomoj restos surtere.

Je tio respondas la alia:

Ĉu la verdaj aŭ la ruĝaj restos?

Mia karega!

Karega mia, ĉu vi deziras jaguar-tipan aŭtomobilon donace al via naskiĝtago?

Ne.

Ĉu eble unun vizonpelta mantelo vi deziras?

Mi dankas, sed ne.

Ĉu vi ĝojus por diamant-kolringo?

Ne. Mi ŝatus disedziĝi.

Ho, tiom grandan elspezon mi ne planis!

/S-ro László Pásztor/

Virtuala Muzeo

Vere, la 17an de majo 2007, dum Mondo Tago de la Informa Socio inaŭguritiĝis la Virtuala Muzeo, en la Avaŝmonta konstruaĵo de la Telefoncentralo de Miskolc. En la ĉ. 600 m² bazteritoria maŝinĉambro de la iama telefoncentralo, en la Poŝtomuzeo en siaj diversaj deponejoj garditajn artobjektojn povas rigardi la vizitantoj interesantaj pri la fakhistorio. La virtuala deponejo helpe de plur centoj da ekspoziciitaj objektoj prezentas la preskaŭ 130 jaran eksplodsimilan evoluon de la telekomunikado. Ĝia propreco estas, ke estas trovebla ĉiu telefonaparato, telegrafo kaj telefoncentraltipo de la landa telekomunikadhistorio, krome transigteknikaj ekipaĵoj troveblas, el inter kiuj multaj ankaŭ niatage funkciokapablas.

Muzeo pri Poŝtoservo

Sur la 4a etaĝo de Miskolca Direktorejo de la Hungara Poŝtakcia Kompanio inaŭguriĝis konstanta ekspozicio prezentita poŝthistorion de Miskolc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Pli ol 200 jaraj historiaj dokumentoj, dokumentaj tratoj, mapoj, objektoj kaj unu pasintjarcentkomenca meblaro, instalaĵo de poŝtoficejo helpas ekkoni la Poŝtoservon en Norda Hungarujo.Apud la lokaj interesaĵoj enkonstruiĝis en la ekspozicion ankaŭ kolektaĵo de malnovaĵoj, fotoj, skribitaĵoj alvenintaj de laborkunuloj de poŝtoficejaj estantaj sur teritorio de la direktorejo.
Viziteblas nur laŭ pli frua telefona sinanonco. Telefonnumeroj: +36 20 979 54487

Sinjorino Adrienne Pásztor

Nova Esperantlingva libro



La esperantigo kaj publikigo de la libro „Legendoj de Miskolc”permesita estas de **la aŭtoroj: Piroska Csorba – Vilmos Fedor.** La libron eldonitan en 2011, **esperantigis: László Pásztor**
La prezenton de la „Legendoj de Miskolc” titola libro, ni komencos en la sekva numero de nia retrevuo, sed antaŭ ĉio, legu el ĝi pri la aŭtoroj.

László Pásztor

„Piroŝka Ĉorba naskiĝis en 1952 en Szuhakálló (vilaĝo Suhakallo) en departemento Borŝod. Ekde sia dekjaraĝo aperas ŝiaj poemoj, skribaĵoj en revuoj, antologioj kaj sonas en radiodissendoj, en televidprogramoj.
Ĝis nun ŝiaj 11 memstaraj volumoj aperis – unufoje en la „Malmola estas la tero” titola versaĵa volumo, kiu aperis ĉe la eldonejo „Eötvös” en 1989 kaj kiel lasta en la „ Fino de orepoko” titola novelovolumo en 2004 ĉe la eldonejo „Supera Hungario”.
Ferenc Kardoŝ faris filmon pri ŝia”Posttagmeze je la 4-a estu ĉe la monumento” titola novelo. Zsolt Podhorányi (Ĵolt Podoranji) aplikis al televido ŝiajn stilekzercojn laŭ titolo „Ganto.”Ŝiajn marionetludojn prezentis la „Bobita” pupteatro de la Nacia Teatro de urbo Pécs (Peĉ) kaj la „Csodamalom”/Miraklomuelejo/ Pupteatro de Miskolc.
Ŝiaj muzikigitaj poemoj estas aŭskulteblaj de ensembloj „Kaláka” kaj „Ghymes”(gimeŝ) , plej laste en la kompakta disko„Kiun lulas la lulilo, Janoŝeton….”, kiu aperis en 2007 je memoro de Attila Kaszás. Ŝi gajnis premiojn pere de ŝiaj skribaĵoj por kreantoj: Patrinlingva konkurso de Ministerio de Nacia Kultura Heredaĵo, 2002; dramkonkurso de „Gárdonyi Géza „Teatro” de Eger, 1986; sociografia konkurso „Alföld/Ebeno/,1985; kaj pluraj literaturaj revuo,-verso,- kaj novelokonkurso.
Oni distingis ŝin en 1992 kun arta kaj kultura premio de Landa Asocio de Hungaraj Sindikatoj kaj en 2002 ŝi ricevis premion „Szabó Lőrinc”. Ŝi estas membro de la Asocio de Hungaraj Verkistoj kaj la „Széchényi” literatura kaj Arta Akademio.
Ŝi estas instruistino de Gimnazio „Herman Ottó” de Miskolc. Ŝi havas la premion „Apáczai Csere János.” Ŝi vivas en Miskolc ekde unu kaj duono da jardekoj.
Vilhelmo Fedor: „Certe en ĉies vivo estas unu tia momento, dum kio sentas tion, ke malkovris iun sekreton. Ĉi tio okazis ankaŭ kun mi, kiam mi trovis negativajn bildojn en iu malnova komodo, en ĝia kesto. Sur la bildoj estantaj miŝkolcanoj ridetis al mi. Inter ili estis ankaŭ mia avino, kun kiu mi neniam renkontiĝis. Mia patrino ŝatis, mia patro konis

Miŝkolcon. Mi foriris de tie multfoje, sed ĉiam revenis. Pro ili, poste ankaŭ pro aliaj. La mondo komencis interesi min, de kie mi alvenis.
…..Kaj mi rigardas en la ĉefstrato, kiam s-rino Déry alvenas, tenante enmane multe da floroj, mansignante al ŝiaj admirantoj, alie Ottó Herman rapidas al „Sötét kapu" /Malhela Pordego". Denove alia Bertalan Szemere, ĉefministro – kiu havas malĝojan sorton - venas al mi. Sur alia flanko de la strato Aleksandreto Ferenczi kuras el vendejo de sia patro sur la straton kaj kune kun Miĥaelo Munkácsy – kiu desegnas sur la stratoŝtonojn per brikero - kuras plu. Kaj ĉiam konataj, nekonataj homoj venas al mi. Ili neniam povis renkontiĝi, nun tamen povas esti kune en ĉi tiu libro…..

Antaŭparolo

Por ekkoni ĉion, kion eblas, kion, aŭ kiun la homo ŝatas, amas. En la Biblio oni nomas la aman brakumadon al „ekkono." Mi povas vidi, aŭdi, flari iun, ion, mi povas kolekti pri iu, io miiloj da indikoj, mi povas mezuri, sekcii, mi povas demandi atestantojn, sed se mi ne ŝatas, amas, tiam nenion ekscias pri ĝi, mi ne atingas ĝiajn sekretojn, realaĵojn, nome mi ne ekkonas tiun, aŭ tion. Nuntempe en epoko de la „realista" arto kaj la fakton malkaŝanta literaturo ĉi tion ni ne scias - , ke la homo bone vidas nur kun sia koro."Ankaŭ Piroska Csorba kaj Vilhelmo Fedor vidas kun sia koro. Ili ŝatas Miŝkolcon. Nome ili konas ĉi tiun setlejon. Ĉi tio donas la plej grandan, pli ol temon montrantan, travivaĵon de la libro. Ni devas rilati ĉi tiel al tiu komunumo, urbo, distrikto, en kiu ni vivas. Estas interesa, ke multe da homoj spertas ĉi tiun travivaĵon kiel hejmsopiro. Mi estas budapeŝtano, sed tion, ke kion signifas por mi Budapeŝto, nur tiam mi ekkomprenas, kiam longtempe vivas eksterlande. Dum mia restado en eksterlando aperas ne la efektiva, sed la en mia animo vivanta urbo dum miaj sonĝoj kaj dume mi iradas inter fremduloj kaj estas en fremda mondo. Ĉiam mi memoradas Budapeŝton kaj ne estas kapabla por forgesi mian urbon. Fedor kaj lia kunaŭtoro skribis ĉi tiun libron tiel, ke ĉi tia „hejmsopiro" regis ilian koron. Ne kun ŝato, sed kun amo.
Laŭ Karinthy la diferenco estas tio, ke en la ŝato ne estas sopiro, nur konstanta sento, sed la ama homo sopiras tiun, kiun amas. Mi konstatas tiun ĉi amon ankaŭ el ĉi tiu libro. Ne la „lokanoj" kutimis sonĝi pri ĉi tia libro, sed kiuj vivas ekzilite, kiuj rekonstruas en siaj animoj tion, kion iama spertis en la realaĵo. Granda sekreto estas por iradi sur unu konata strato, kvazaŭ mi „revenintus", por rigardi unun konstruaĵon, unun statuon, kvazaŭ mi vidintus unufoje, aŭ adiaŭus de tiuj. Nur kiu amas ion, aŭ iun, tiu scias, ke ĉi tio ne povas daŭri delonge. Tio ĉi estas tre ege bedaŭrinde. Pro tio tiu volas konservi ĉion, atenteme rigardi kaj vidi kaj memoradi, konservi memoron de unu strato, eĉ ĝian etoson kaj ankaŭ historion. La alia, eble pli grava afero, ke kiu ĉi tiel ĉirkaŭrigardas, al tiu parolas la loka pasinto pri la iam ĉi tie vivantaj famaj homoj, kies spiritoj ankaŭ nun ĉeestas – sed ankaŭ spiritoj de tiuj, kiuj neniam vivis ĉi tie, nur elpensitas personoj estis. Ni scias, ke ne la labortaga monotoneco kuntenas la homojn, sed la legendo. Unu familio havas legendojn, kiel unu popolo kaj se ĉi tiujn legendojn oni forgesas, tiam la komunumo formortas. Ĉi tio estas ege simpla. La legendoj, mitoj pli abunde radikiĝas en ni, ol memoraĵoj de nia transvivita historio. La animo fabrikas senĉese legendojn kaj laŭ tiuj vivas: tiu fotelo, kiu estas en angulo de mia ĉambro, estus unu eluzita, malnova, aĉa meblo, se ne sidintus en ĝi mia avo. Sed pro tio ĝia valoro estas netaksebla. Ankaŭ tiam, se neniam sidis en ĝi mia avo, nur mia patrino diris tion. Se mi imagas jam tion, , ke mia avo sidis en ĝi, eĉ tiam tiu fotelo por mi estas sankta objekto, se la fotelo ege aĉa. Ĉi tiel funkciis iam, ĝis estis vera, ĉiuj artoj kaj religioj.

La mito, la legendo estas memoraĵoj de la homoj, la famaj homoj, kiuj estas animoj de la urbo. Tiuj sentiĝas el la muroj, en la aero kaj en animoj de la ĉi tie vivantoj. Kaj se la homoj forgesis tiujn, tiam estas inda la homojn memorigi ĝin – ĉar sen legendoj, mitoj la urbo formortas. Kiel unu korpo neniiĝas sen animo,, tiel formortas ĉiuj homaj komunumoj sen unu nevidebla kuntena kolektiva legendaro. Ĉi tion ni jam ne konas, sed se ĉe iu ĉi tiu senso reviviĝas, tiam mi estas emaj tiunmisfamigi pro la anakronismo. Nek por ami estas anakronisma.

Urbo de la legendoj ne nur pri Miskolc pritemas. Ankaŭ pri la lando, ankaŭ pri la homa vivo, - ĝiaj multaj historioj iĝos parto de la hungara legendaro. Samtempe ĝi sugestas spiritan vidmanieron. Ni povas vidi nur ĉi tiel nian mondon, kiu estas infektite de zorgoj, malfacilaĵoj, egoismaj interesoj, pri mono kaj profito pritemante, kiuj igas nian mondon al taŭga por vivi. Ankaŭ mi provas rigardi ĉi tiel. Mi demetas tiujn okulvitrojn, per kiuj mi vidas la okdek kilograman dikan viandamason, kies haroj falas, kiu estas okulvitra, kaj ĉar estas maljuna, havas odoraĉon, movas lia dentarprotezo, tremetas liaj manoj pro kio ŝi manĝmakulis sin – kaj metas aliajn okulvitrojn, pere de kiuj mi vidas, ke tiu kompatinda, mortem homo estas mia patrino. Ĉi tiu libro regalas ĉi tian vidmanieron.

Petro Müller”

- Daŭrigo sekvos -

En nia patrujo la jaro 2012a estas jaro de defendo de la Buteo buteo

La buteo estas rabobirdo, trovebla en nia patrujo same kaj sur ebena- kaj sur monta regiono. Ĝia nomo jam malkaŝas pri ĝi, ke tre volonte ĉasas ĝi musojn kaj aliajn ronĝulojn. Ĉar ĝia nutrofonto tutjare disponas je ĝi, niapatruje konsstante vivanta besto estas, eĉ ĝia populacio plidensiĝas vintre kun la ekzempleroj alvenantaj al ni de nordo. Surbaze de la rezultoj de la landaj primezuradoj la niapatruja populacio de la buteo ne montris esence kalkuleblan ŝanĝiĝon dum la pasintaj 10 jaroj. La pli fruaj laŭcelaj ekzamenoj tion montris, ke ĝi finas seriozan ekonomian profiton pere de ekstermo de la ronĝuloj.

/Fonto: komuniko de Asocio de Hungara Ornitologia kaj Naturdefenda./

Esperantigis: s-ino Adri Pásztor

Ĉu vi scias, ke …

/1/ la **monaĥejo de 10 000 Budhoj** troveblas en Shi Tin en Ĉinio,
/2/ en 2012, la nombro de la libro-volumoj troveblaj en la **Digitala Biblioteko de la hungarĉefurba Budapeŝto** estas 20781,
/3/ la **salejo en Bolivio;** la Uyuni estas 10582 km² teritorio da salo,
/4/ **la plej alte flagranta standardo** de la mondo troveblas en Norda-Koreo,
/5/ en Sirio, **Damasko** estas supozeble la plej longe kaj daŭre loĝata urbo de la mondo,
6/ la **Hungaro Farkaŝ Kempelen** (1734-1804) - unue en la mondo – strukturis parolantan maŝinon ĉirkaŭ en la jaro1770, kiu la en ĝin premitan aeron transformis al aervibrado, simila al homa voĉo. El ĝi la unusola restinta ekzemplero niatage troveblas en Munkeno Germanio; en la Deutsches Museum. Lia eseo verkita pri la homa parolo estas kreanto de la modernaj fonetikaj esploroj,
/7/ Nia granda poeto **Johano Arany,** antaŭ 195 jarojn naskiĝis kaj mortis 130 jarojn (2. Marto 1817 – 22. Oktobro1882). Li, estis aŭtoro de versaĵa trilogio Toldi, poemaj rakontoj, multaj belaj poemoj kaj grandsignifaj eseoj. Per la Toldi, atingis li amikecon de Petőfi, de nia alia samepoka elstara poeto. Liaj poemoj verkitaj post la 1848-1849-a liberecbatalo, gardas glorajn tradiciojn de la revolucia poezio kaj liberecbatalo. Pri Johano Arany plie, ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/János_Arany

8/ En 2012, la 14an de Februaro, estis 100 jara la mondvojaĝinto Tibor Sekelj, kiu konis ankaŭ Esperanton inter la de li konataj pli ol 30 lingvoj. Li ne nur parolis, sed ankaŭ verkis tiu ĉi lingve. Li ĉeestis inaŭguron de la Kalocsay-busto en Abaujszántó. Artikolon de Vikipedio vidu pri lia vivo, ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj Eŭropa Esperanto-Unio deklaris la jaron 2012 „**Jaro de Tibor Sekelj**". Ĉi-okaze Hungaria Esperanto Asocio aranĝis festan kunvenon, la 22-an de Februaro 2012, honore al la centa datreveno de lia naskiĝo, kie okazis gast-prelego de lia edzino: Erzsébet Székely. /Harnyos/

//9/ ĉe ĉi tiu retejadreso: **http://www.noltv.hu/video/4163.html** vi povas atenti kiel kortuŝe okazis je la 9-a de Februaro en 2012, la serenad-dono al **la eks-prezidanto de Hungara Respubliko: sinjoro Árpád Göncz**, okaze de lia 90-a naskiĝtago. La Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos" tutkore gratulas tiuokaze sinjoron Árpád Göncz.
/10/ **Sinjorino Adri Pásztor** (redaktorino de ĉi tiu revuo) komencis lerni la internacian lingvon Esperanto, en Februaro de 1962,
/11/ Ekde Februaro de 2012, **la reta tradukilo de Google** komprenas kaj parolas Esperanton, kiu iĝis la 64-a lingvo, subtenata de la retejo. Tio signifas, ke eblos traduki al kaj el Esperanto ne nur en la tradukretejo de Google, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj retaj servoj, kiuj uzas la saman tradukilon. http://www.liberafolio.org/2012/google-ektradukas-esperanton /by Redakcio — filed under: aktuale Laste modifita: 2012-02-23 13:37/Germain Pirlot/ *La tradukilo de Google funkcias ĉe la retejo:* http://translate.google.com/ inter aliaj ankaŭ por la lingvoj Hungara kaj Esperanto. Pro tiu granda paŝo ni gratulas Googl-on! (Pásztor)

S-ino Adri Pásztor

Prelego ĉe Hungara Esperanto-Asocio

Karaj niaj legantoj!
Ĉe la nialanda Esperanto-Asocio, la 12an de januaro okazis la prelego de doktorino Anna Orsós pri la „Beaŝ-aj" lingvoj. La prelegantino transsendis la tekston de sia prelego al nia gazeto, por informi vin. Bonvolu akcepti ame kaj honore nian sampatrujaninon.

S-ino Adrienne Pásztor

Doktorino Anna Orsós

Biografio

Sinjorino Anna Orŝóŝ komencis karieron kiel bazlerneja instruistino, poste mezlerneja tio, pri la fakoj: hungara-rusa-pedagogia. Ekde la jaro 1992a, du jarojn ŝi agadis kiel fondinta instruiosto de la gimnazio Gandhi, kie ŝi instruis en ĉefposteno ĝis 2002. Krom tiu ĉi ŝi instruis „Beaŝ"-an lingvon ankaŭ ĉe la „Csokonai Vitéz Mihály" Instruisteduka Altlernejo de Kapoŝvár. De 2002 ŝi estas ĉefpostena asistanto de la Romologia Fakultato ĉe la **S**cienca **U**niversitato de urbo **P**écs (**PTE**) post la defendo de PhD (doktoro pri filozofio), ĝia adjunkto. Inter 2002 kaj 2010 ŝi estis la duonpostena laborkunulo de la Lingvoscienca Institucio de la Hungara Scienca Akademio. De 2010 ŝi estas duonpostena profesorino ĉe la Pedagogia kaj Fsikologia Fakultato de ELTE kaj la duonpostena estrino de la Pedagogia Centro. Dum printempo de 2011 ŝi habilitis en La Sociscienca Doktora Lernejo de la Scienca Universitato de Péĉ.
Kiel universitata adjunkto ŝi lekcias lingvistikajn kaj Beaŝ-lingvajn kursojn por studentoj kaj dumtagaj kaj PhD-aj. Ŝi estas gvidantino ĉe la PTE (**S**cienca **U**niversitato de **P**écs) de la katedro pri Romologio kaj Eduksocologio, kadre de BTK (Fakultato de Filozofiaj Sciencoj) gvidantino de la „Profex" Beaŝa Lingvoekzamenejo funkcianta ĉe la universitato, ŝi estas aŭtorino de multnombraj publikaĵoj. (Profex estas fantazianomo)
Ŝiaj esplorterenoj estas: socilingvistiko, la sociaj seksoj (: en ĉi rigardo la esprimo kaŝas la lingvoaplikajn diferencojn inter viroj kaj virinoj, la virina estas konata lingvistika tereno laŭ laŭnome genderlingviko – gender = socia sekso kaj ne la biologia) kaj lingvouzo, lingvopolitiko, lingvaj homaj rajtoj, etnika lingvoinstruo, etnika lingvouzo.

La lingvo Beaŝ-a en Hungarujo

La preleg-tekston pretigis la prelegantino doktorino Anna Orsós; adjunkto ĉe la Scienca Universitato de urbo Pécs, katedro pri Romologio kaj Eduksociologio BTK NTI.

ĜENERALA ENKONDUKO

I. Pri la Ciganoj

Konsidere la nombron de la Cigana loĝantaro, inter 38 eŭropaj landoj – post Rumanio, Bulgario kaj Hispanujo – Hungarujo okupas la kvaran lokon. (NEKH 2005)
Koncerne la konstaton de la nombro de la hungaruja Ciganaro, en la pli fruaj jarcentoj okazis cigannombradoj, sed la datumoj estas sufiĉe kontraŭdiraj unu al la aliaj, tial ili rolas tre mankhave ankaŭ en la censoj. Ĉar ili vivas periferie, ili estas malfacile atingeblaj, malfacila estas unusence determini: kiuj estas ili. Pluraj, laŭ plurspecaj vidpunktoj provis kategoriumi la ĉefajn kategoriojn de la esto Cigana, sed akceptita kaj unueca difino ne elformiĝis. Esti Cigano – pro la diversaj antaŭjuĝoj enradikiĝintaj dum jarcentoj - por unu parto de la socio signifis malalt-prestiĝan aferon. La plimulto de la Ciganoj konfesas sin apartenantaj al la majoritata socio ja kutime la Ciganoj akceptas la lingvon de la ŝtato akceptanta ilin, aŭ la religion de sia medio, ĉar nur en kelkaj ŝtatoj oni rigardas ilin etno, sed aliaj, ne havante patrinlandon vicigas sin al la etna malplimulto. Ĉi tio estas la kaŭzo de tio ke aparte grandaj diferencoj estas ĉie en la mondo inter la oficialaj censaj, kaj la science taksitaj datumoj.

1. numera tabelo

DATUMOJ KONCERNAJ AL LA CIGANA MALPLIMULTO EN LA CENSOJ (1949-2001)

JARO	CIGAN-MINORITATO
1949	**37 598**
1980	**6 404**
1990	**142 683**
2001	**190 000**

Naciminoritataj datumoj de Hungarujo. Budapeŝto. (KSH/Centra Statistika Oficejo) 1992, 2001.)
La hungaraj Ciganoj apartenas al tri grandaj grupoj: al la plejparte hungare parolantaj *Romungroj* (kiuj diras sin hungaraj Ciganoj, muzikistaj aŭ muzikantaj Ciganoj), al la hungare kaj romani-lingve egale parolantaj *Vlah-Ciganoj,* kaj al la hungare kaj arkaik-rumanlingve parolantaj Ciganoj nomitaj *Beaŝaj Ciganoj*. (Vd. la II. numeran aneksaĵon.)

I.1. Eŭropa elrigardo

Multaj sociesploroj pruvas ke aparteni al la cigana malplimulto – en iu ajn parto de la mondo – signifas specifan situacion. Kaj la pli, kaj la malpli larĝa socia medio influas la akcepton de identeco, kaj ties mezuron. Se la medio estas akceptema kaj taksas la aliecon valoro, la idento-akcepto de la komunumo kaj de la individuo estos rimarkeble pli granda pro la prestiĝo-gajno, sed kontraŭokaze rimarkeblas ĝuste ties inverso. Pri la nuno de la Cigan-komunumoj vivantaj en la ĉirkaŭaj landoj aŭ en iu ajn lando de la mondo ni disponas pri multspecaj informoj, sed pri ilia historio ni havas malmulte da aŭtentikaj fontoj. Ties ĉefa kaŭzo estas ke la elformiĝo de ilia skribado estas produktaĵo nur de la pasintaj cent jaroj, tiel skribajn spurojn ili mem ne lasis al la postepoko, la dokumentoj pri ili naskiĝis nur dum konfliktoj kun la majoritata socio, sed el la „pacaj tempoj" tiaj verkoj ne troveblas. Nombro de la Ciganoj en Eŭropo, laŭ la taksadoj estas 7-8,5 milionoj da homoj, kvankam ne ekzistas datumoj pri ĉiu Eŭropa lando (Kemény/Kemenj/2002). Laŭ iuj taksadoj la plej granda Cigan-etno de Eŭropo estas la Ciganaro en Rumanio, kiu ampleksas 2,2-2,5 milionon, ilia oficiala nombro kreskis inter 1977 kaj 1992 de 227,4 (1,1% de la loĝantaro) al 409,7 miloj (1,8%). Sur la tertitorio de la eksa

Jugoslavio (650-850 mila) Ciganaro vivas: en Serbio 450 miloj, en Macedonio 240 miloj, en Montenegro 60-150 miloj. (Kemény 2002).La taksita nombro de Ciganoj en Hungarujo estas 400-600 miloj, sed oficiale (Centra Statistika Oficejo, en 2001) estas 190 miloj.

I.2. Nombro de la Cigan-loĝantaro

La ĉiudekjaraj censaj datumoj ekde la fino de la 19-a jarcento, - kiuj estas ankaŭ listigoj laŭpatrinlingvaj – montras grandajn diferencojn. Ties kaŭzo klarigeblas per la migra vivmaniero, kio signifas kaj en- kaj elmigradon. La unua – antaŭpreparita, zorgeme farita, ankaŭ detalajn datumojn montranta – hungarlanda esploro koncerne tiun ĉi popolgrupon estis la t.n. ”Censo de Ciganoj”, efektivigita je la 31-an de Januaro 1893, kiu en aparta ĉapitro pritraktas „la lingvokonojn kaj la naciminoritatajn rilatojn de Ciganoj.” Pri la 280 mil-nombra Ciganaro vivanta en la tiama Hungarujo, ni povas legi: ”… pli ol la duono de la Ciganaro, 52,16%, ne konas la Ciganan lingvon. En kelkaj kazoj la kono de la Cigana lingvo en si mem ne estas decida rilate al la kutima konduto de persono; la tute civilizitaj individuoj, ekzemple la elitaj muzikistoj, konsidereblaj kiel artistoj, plej ofte scipovas Cigane, dum la Cigane ne sciantoj, ĉefe la sporade enloĝintoj en la Vlahaj kaj slovakaj vilaĝoj, ofte estas tre primitive kulturitaj kaj tre feroc-emociaj individuoj. Sed la granda nombro de la Cigane nesciantoj entute estas certa signo ke ĉi popolelemento malporoksimiĝas de sia originala raso, kaj proksimiĝas al la ceteraj elementoj de la nacio…” (Mezey 1986)

Unu celo de la 1893-jara esploro estis la pritakso de la vaga Ciganaro cele de la rapidigo de ilia fiksloĝigo. La esploranalizo – inter ceteraj – konstatas ke la forlaso de la Cigana lingvo helpas la integriĝon en la plimultecan socion. Konvene al tio, la intereso de la ”potenco” ne povas esti iu ajn aranĝo koncerne la konservadon de la Cigana lingvo, eĉ la latenta intereso povas esti nur la fiksloĝigo de la Ciganaro, kaj ties helpanto, la procezo de la lingvoforlaso. En tiu tempo-periodo multego da ediktoj aperis, kies plimulto celis la likvidadon de la migra vivmaniero de la Ciganaro, kaj ilian plej rapidan fiksloĝigon.

Ekde la komenco de la 20a jc. la decida plimulto de Ciganoj jam ne daŭrigis la migran vivmanieron, vivis fiksloĝinta. La ordigon de ilia situacio – ĉar la Ciganan problemon oni konsideris grava socia problemo – pluraj provis solvi plurmaniere. Ne nur unu dispono rezultigis amasan fuĝon el la lando de la jam ekloĝintaj Ciganfamilioj.

Post la 1893-a landa esploro pasis 80 jaroj ĝis la sekva ĉiorilata esploro. Koncerne la nombron, lingvajn grupojn kaj gepatralingvan disdividiĝon de la hungarlanda cigan-loĝantaro, nur la reprezentivaj sociologiaj esploroj de István Kemény kaj liaj laborkunuloj - faritaj en 1971 (poste denove en 1993 kaj en 2003) – enhavas statistikajn datumojn.

1.

2. numera tabelo

Naciaj datumoj koncerne la cigan-malplimulton en sociologiaj esploroj:

Jaro	**Nombro**
1893	**280 000**
1971	**270 000-370 000**
1993	**420 000-520 000**
2003	**520 000-650 000**

Fonto: *Rezultoj de la Cigan-censo de la 31-a de Januaro 1893 kaj la „Situacio de la Cigan-loĝantaro. Landaj esploroj en 1971, 1993, 2003". /Laŭ la datumoj de Kemény-Janky.*
Surbaze de tiuj sociologiaj esploroj iĝis vaste konata ankaŭ la klasifiko de la proporcioj de la tri lingvaj grupoj de la hungaruja Cigan-loĝantaro. (Kemény 1974; Kemény-Janky 2003).

La esploroj, pro la trompaj datumoj devenantaj el la memklasifiko, prefere utiligis la mediajn opiniojn dum la kvalifikaj notadoj. Nome pluraj konfesas sin Hungaroj malgraŭ la konfesoj pri la gepatra lingvo kaj deveno. Tial, ĉi esploro konsideris Ciganoj tiujn, kiujn la necigana medio opinias tiaj. „Ĉar ĉiu sperto montras ke la Cigan-medio kalkulas ankaŭ pri la deveno de la sukcese asimiliĝantoj, eĉ el la tiamaniere determinita Cigan-loĝantaro forrestis nur la senspure asimiliĝantoj, sed ilin rigardi kiel subjektoj de la esploro estas neetika." (Havaŝ-Kemény.1995)

Tiu ĉi klasifiko - laŭ la sociologia esploro farita en 1971 – vicigas la Ciganojn al tri grandaj lingvaj grupoj: hungare parolantaj *Romungroj* (kiuj diras sin Hungaraj-Ciganoj aŭ muzikistaj Ciganoj), *Vlah-Ciganoj* (parolantaj egale kaj hungare kaj rumane) kaj *Beaŝ-aj Ciganoj* parolantaj kaj hungare kaj la arkaikan rumanan lingvon.

Kvankam tiu ĉi divido estas grandsignifa el sociologia vidpunkto, el la lingvistika vidpunkto ĝi estas plurloke dubinda, ĉar ne ĉiu hungare parolanta cigan-identeca persono konsidereblas Romungro. Tiel okazas ekzemple ankaŭ ĉe la lingve asimiliĝintaj Beaŝ-aj Ciganoj, kiuj forte gardas sian Beaŝ-an identecon, sed same okazas ankaŭ en la kazo de pluraj aliaj malplimultoj. Ĉe la Ciganoj jam nur hungare parolantaj la deveno kaj la gepatra lingvo jam disiĝis unu de la alia, sed la akcepto de la grupmembreco eĉ sen la gepatra lingvo aperas kiel tre grava identeciga faktoro.

La enklasigo de Kemény ne parolas pri tio, ke la hungarlandaj Romungroj ne estas nur unulingvuloj, tion pruvas tiuj lingvoinsuloj kie la Cigan-muzikistoj ankaŭ nun parolas la Romungron /Hungarciganan varianton de la lingvo Romani, kiun la anglalingva Romani-dialektologia fakliteraturo vicigas inter la centraj dialektoj de la lingvo Romani.

Je la determinado de la nombro de la Hungarcigana loĝantaro, konsiderante ankaŭ la reprezentivajn censoj gviditajn de István Kemény en 1993 kaj 2003 direblas ke inter la Romungroj kreskis la nombro de la akceptantoj de la nacieca apartenado, dum inter la Beaŝ-oj kaj Vlah-Ciganoj, paralele kun la integriĝo, iom malpliiĝis la proporcio de la akceptantoj de sia Cigana nacieco. En Hungarujo nuntempe oni taksas la nombron de Ciganoj al 570 000 - 600 000, sed unuopaj opinioj aludas al nombro de 800 000 -1 000 000 (Kemény-Janky 2003)

- Ni daŭrigos -

/Prelegon de adjunktino doktoro Anna Orsós esperantigis Adrienne Pásztor, lingve reviziis Josif E. Nagy; Rumanio/

Leterkesto

125 jaras la lingvo Esperanto

„Estimata S-ino Lászlóné Adrienne Pásztor,

La jaro 2011 portis sukcesojn en la eksteraj rilatoj de UEA:

- UEA faris kunlaboran kontrakton kun Infoterm (Internacia Informejo por Terminologio), kiun UNESCO fondis por kunlaboro en la kampo de terminologio;
- Internacia Organizaĵo por Normigo (ISO) akceptis UEA kiel membron en kvar gravaj subkomitatoj, per kio UEA fariĝos pli videbla al terminologiaj fakuloj;
- UEA ĉeestis la Unuan Tutafrikan Kongreson pri Kulturo;
- pluraj proponoj de UEA pri lingvaj rajtoj estis aldonitaj al la fina deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiun UN okazigis en Bonn (Germanio).

En 2012 UEA daŭrigos la laboron por fizike gardi (transmeti ĉion en acid-rezistajn skatolojn) la librojn kaj dokumentojn en la Biblioteko Hector Hodler. Tiu laboro komenciĝis en 2011.

La 125-jara jubileo de la Unua Libro ekigis kampanjon por mondskale interesigi homojn al la lernado de Esperanto.

Lige kun la 97-a UK en Ĥanojo, UEA lanĉis la monkolektan kampanjon "Libroj por Vjetnamio", per kies rezulto vjetnamaj kongresanoj ricevos donackuponon por senpage elekti librojn kaj aliajn varojn en la kongresa libroservo.

UEA kore dankas vin pro via jama pago de kotizo por 2012 kaj esperas pri via kunlaboro, ankau finance, por la diversaj agadoj en 2012!

Dezirante al vi sukcesplenan kaj sanan 2012, sincere salutas,

Loes Demmendaal, estrarano pri financo"

La lingvo Esperanto en 2012 do fariĝos 125-jara

Sendube Esperanto havis grandan sukceson! Hodiaŭ Esperanto estas plene vivanta lingvo, parolata en pli ol 120 landoj kaj teritorioj. Supozeble Esperanto troviĝas inter la 30 - 50 plej ofte uzitaj lingvoj por internacia komunikado (do ne kalkulante la komunikadon inter homoj kun sama patrina lingvo). Tiun sukceson atingis Esperanto nur pro libervola lernado, sen militoj kaj sen granda financa helpo de ŝtatoj.

Plia disvastiĝo de Esperanto egalas al pliaj uzeblecoj, pliaj legantoj de nia literaturo, pliaj aŭskultantoj de nia muziko. Preskaŭ ĉiu Esperanto-parolanto devus interesiĝi pri Esperanto-informado por atingi, ke pli da homoj en la mondo parolu kaj uzu Esperanton.

Ni petas vin laŭeble forte subteni la iniciatojn de Esperanto Internacia, Universala Esperanto-Asocio, ILEI, aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj individuoj informi en 2012 (kaj kompreneble poste) pri Esperanto.

Al vi kaj viaj familioj ni deziras bonan jaron 2012 kun multe da paco, feliĉo kaj sano! Esperanto Internacia, Martin Schäffer”

Vojaĝo al la UK en Ĥanojo

http://vojagxo.info/2011/09/17/lau-transsiberio-en-hanojo/
El <http://vojagxo.info/>
http://vojagxo.info/wp-content/themes/mimbo2.2/images/logovoj.png

Projekto de laborplano pri landa kaj regiona agado 2011-2013

Surbaze de la Strategia Laborplano de UEA proponata la periodo 2011-2020 kaj de la decidoj de la Komitato en la laŭvicaj laborsesioj, nia agado por la mandatperiodo 2011-2013 starigas la jenan celojn per laborplano, adaptebla laŭ konkretaj bezonoj kaj cirkonstancoj:

Celoj. Agadkampoj:

1. Informado, Jardeko de lingvoj

a. Sur ĉi tiu laborkampo ni daŭrigos la tradician diskonigadon de la lingvo Esperanto kaj de la atingoj de la movado. Ĉi-periode ni aldonas la emfazon, ke esperantistoj delonge kontribuadis al la diskonigado de la lingvoj kaj komunumoj kiel konservindaj valoroj. Partopreni publikajn forumojn informcele, ekz. Librofoiroj. Laŭeble, mem iniciati kunorganizon de tiaspecaj eventoj lige al la landaj kaj lokaj kondiĉoj, ĉe universitatoj, asocioj de UN kaj similcelaj organizoj.

b. Diskonigindaj Vizaĝoj. Kunmeti materialojn kaj laŭeble apartajn verketojn pri diskonigindaj esperantistoj enlande kaj loke, kaj ni tie emfazas la kontribuon de tiuj figuroj ankaŭ al la tutlanda kulturo; internacinivele, oni nomas tiun ĉi agadon Projekto Vizaĝoj.

c. Produkti kaj ĝisdatigi profesi-nivelajn informmaterialojn pri Esperanto kaj ĝia movado, transdoneblaj al la ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesiĝantoj ktp.

ĉ. Renovigi kaj daŭre aktualigi la landajn kaj regionajn (de la komisionoj) retpaĝojn por informi kaj varbi al la ekstera publiko.

2.Kulturo; Edukado: Profiligi Esperanton kiel ilon por prilingva konsciigo

a. Kreado kaj diskonigado de klerigaj materialoj en Esperanto. Per tiuj materialoj ni pretigas niajn agantojn por pli efike agi sur la unua laborkampo kaj kultivas la Esperantajn lingvon kaj kulturon mem; laŭeble elekti iujn individuojn, pri kiuj oni disponigas tekstojn en Esperanto;

b. Por pludisvastigo, oni reliefigu per etnolingvaj, nacilingvaj tekstoj tiujn atingojn de la landa aŭ internacia movado, kiuj plej rekte helpos la publikon pli juste taksi la historian kontribuon de la Esperanto-movado al la kulturo de la unuopaj landoj kaj de la mondo. Laŭ propraj kondiĉoj kaj realisme, krei aŭ restarigi laborgrupon pri movada landa aŭ regiona historio.

c. Resti en nacinivela kontakto kun ŝlosilaj neregistaraj organizaĵoj, aŭ enlandaj institucioj, ministerioj de kulturo kaj kun la Unesko-komisiono kaj aliaj similcelaj organizoj.

3. Organiza Fleksebliĝo: Landaj organizoj, kluboj kaj individuoj rolu pli aktive kaj centre en la desuba agado de UEA en ĉiuj kampoj. Daŭre instigi niajn aktivulojn kaj gvidantojn pri nia rolo disvastigi Esperanton, instrui kaj baki esperantistojn unualoke kaj labori por proksimigi pliajn homojn al UEA-agadoj.

a. Kunordigo de reorganiza laboro Kunagado laŭ celoj, metodoj, rimedoj, homoj.Laux la konkretaj cirkonstancoj utiligi la tradiciajn strukturojn kaj la novajn teknologiojn. Identigi reton de lokaj kaj regionaj aktivuloj.

b. Eksplicite kaj kolektive difini celojn sur ĉiu nivelo de la agado; identigi la metodojn, rimedojn kaj ekstermovadajn partnerojn, per kiuj labori al tiuj celoj; plani kaj plenumi la laboron surbaze de la kapabloj kaj limoj de tiuj individuoj, kiuj agas.

c. Kunlabore kun ILEI-sekcio kaj fak-aktivuloj akceli la produktadon de lerniloj kaj alispecaj klerigaj materialoj kaj tekstoj kiuj utilu por instru-kaj-edukaj celoj.

ĉ. Starigi laborprogramon de instruista trejnado kaj seminarioj, kiel esencan elementon de starigota ekzamenado pri Instrukapablo kaj landaj ekzamenoj.

Maritza Gutiérrez González

estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado –Szilvási - Heamembraro:891 Fw: labor-plano"

Ĉu Esperanto instruota en Universitato de Rijeka?

La 3-an de novembro 2011 okazis kunveno ĉe Filozofia fakultato en Rijeka pri la temo pri ebla enkonduko de instruado de Esperanto ĉe la fakultato. La Kunvenon kunvokis vicdekanino de la Filozofia fakultato prof. Dr-o sc. Ines Srdoč-Konestra. La kunsidon ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de Esperanto Societo Rijeka, Vjekoslav Morankić, dipl.oecc, prof. Dr-o sc. Danijela Bašić-Karković kaj prof. d-ro. sc. Sanja Barić. En la enkonduka vorto vicdekanino Ines Srdoč-Konestra akcentis, ke ne ekzistas iuj seriozaj obstakloj por enkonduki Esperanton en instruan programon kiel elekteblan (fakultativan) studobjekton. (...)
Esperanto Societo Rijeka proponis por tiu tasko la kompetentan personon, kiu kontentigas la antaŭviditajn postulojn: Tea Radovanović, diplomiĝinto ĉe la Ekonomia fakultato en Rijeka kaj diplomiĝinto ĉe Univerisitato Adam Mickiewicz en Poznano en Pollando. (...)
La ĉeestintoj de la kunveno informiĝis pri similaj elekteblaj studobjektoj instruataj ĉe Filozofia Fakultato de Zagreba Universitato. (...).
Estas proponite, ke teknike la Fako de kroatistiko estu la fako el kiu ekkomencu la propono por la enkonduko de la cititaj elekteblaj kolegioj al la alia fakaro de la Filozofia fakultato samkiel al aliaj fakultatoj de la Universitato de Rijeka. Prof. Danijela Bačić-Karković prezentu al la membroj de tiu ĉi fako la intencon kaj historion de la ideo por enkonduki Esperanton en la universitatan studoferton en Rijeka. La financaj rimedoj ĉe la universitato estas limigitaj, kaj por iuj studobjektoj estas ĉiam serĉataj aldonaj financaj rimedoj. (...)
La rimedojn de la universitato oni povus utiligi nur se la studobjekto estus prelegota en almenaŭ tri fakultatoj. Oni supozas ke, krom la filozofia fakultato, tiuj fakultatoj povus esti: la Jura kaj la Ekonomia.
Vjekoslav Morankić - El revuo Tempo, 2011/decembro/ Germain Pirlot

„Fotaroj pri la 47-a Brazila Kongreso de Esperanto

Musklaku suben por vidi kelkajn fotojn prenitajn de Ivan, mia edzo:
https://picasaweb.google.com/llqpessoa/47AKongresoDeEsperantoTaguatinga?authuser=0&authkey=Gv1sRgCNWr8YS14IamjwE&feat=directlink
Pere de la suba ligilo vi vidos fotaron de alia Esperantisto:
https://plus.google.com/photos/111357119917275891714/albums/5699831722625214993

Brakumon, Liette Pessoa"

Ampleksa kaj kompleta artikolo en "**LA ONDO de Esperanto**":
http://sezonoj.ru/2012/02/209nika/ /Sendinto: Germain Pirlot/

Vizitu la **novan portalon** ĉe: http://nunonia.com /Germain Pirlot/

NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739
Tel.: + 36 70 570 8895
Tel.: +36 46 738 982

Retpoŝto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu
Retpaĝo: http://kiralylajos.uw.hu